

TEATRO



EN

SOCIETO

Eldonis Kroatia Esperanto Servo  
Zagreb, Amruševa 5/I

\*

Aprobo: Lingva Komisiono  
de Jugoslavia Esperanto  
Federacio

\*

Preso: Celjska tiskarna, Celje

REMEMORE  
PRI LA  
DEKA DATREVENO DE LA FONDIĜO:

ESPERANTO-SOCIETO »BUDE BORJAN\*,  
ZAGREB JUGOSLAVIO

Dum dek jaroj ni ĉiusemajne organizadis societajn kunvenojn kun programoj. Estis necese ke ili estu ankaŭ distraj. Teatraĵoj tre plaĉis al niaj membroj. En la ekzistanta esperantista literaturo ni ne trovis sufiĉe da materialo, pro tio ni fondis Literaturan sektion, kiu verkis kaj Draman, kiu nescenigis niajn teatraĵojn. Ili ĉiuj estis prezentitaj en nia simpla societejo sen scenejo, sen kulisoj, sen maskoj kaj kostumoj antaŭ seĝoj de la rigardantoj. Ili reprezentas parton de nia dekjara laboro. Ne la plej valoran, sed certe la plej gajan. Ni proponas nian sperton al ĉiuj societoj en la mondo kaj se ili povos utiligi niajn verketojn, ridigi kaj kontentigi siajn membrojn, tio estos por ni la plej ĝoja sento okaze de nia dekjara jubileo.

Zagreb, decembro 1955.

La celo pravigas rimedon. Konsolo por mi. Mi ne hezitis ŝteli ideojn el filmoj kaj noveloj, kies aŭtoroj forgesis provizi ilin per subskriboj. Ĉio estis bona, kio taŭgis por kreo de miaj teatraĵoj. Sed mi ankaŭ konstatis, ke miaj ŝtelderivitaj verketoj havis la saman sukceson kiel la honestaj. Estas, ja, konate, ke la ŝtelita varo ne portas stampon pri sia deveno. Se miaj alŝtelaĵoj ridigos Vin, Via ĝueto honestigos mian agon.

*Juli pp  
Lafame*

Kiel ĉiu homo tiel ankaŭ mi havas junaĝajn pekojn. Vespere, dum la fakultataj studoj, anstataŭ lerni, kumtime mi preferis amori kun la muzo Talia. Tiu konkubineco multe min kostis, ĉar la profesoroj tro ofte devis dum ekzameno deklari »Kara Shertse, mulo vi estas!« — kaj surpaperigi negativan noton. Jes, bedaŭrinde, Mulo kaj Mulo mi estas, kaj ne nur ŝerce, sed plej serioze; Mulo ĉar oni min tiel baptis kaj mulo, ĉar mi lasis min tiel facile kapti de la amajistino Talia.

Sed Talia — kiu intertempe aĉe forlasis min — ne kulpas nur pri miaj fakultataj malsukcesoj. Ŝi rifuzis kiam ankoraŭ estis tempo, seniĝi de la fruktoj el nia amo kaj naskis al mi kelkajn bastardojn. Ĉion mi faris por ilin kaŝi, malkonfesi, eĉ (ho, patro kruela!) ekstermi, sed vane. Forpasis jam kelkaj jaroj de ilia naskiĝo, ili pliaĝigis kaj nun, kiel modernaj esperantaj infanoj, energie postulas eksterlandan vojaĝon. Kiel ajn mi hontas pri iliaj deveno kaj aspekto, tamen kun malpeza koro mi decidis plenumi la patrajn devojajn kaj prizorgi ilian ekvojaĝon en la Mondon.

Karaj legantoj, kiel ajn stultaj kaj senvvaloraj vi trovos miajn infanojn, ne koleru kontraŭ ili. Konsideru, ke tiujn ecojn la kompatinduloj heredis de sia patro kaj ne kondutu al ili tro severe, ĉar ili ja estas mizeraj orfoj, vagantaj en la Mondo, sen patrino... kaj nun eĉ sen patro.

*Shertse mulo*

POR LA KUNVENOJ  
DUM LA DEKKVARA  
DE DECEMBRO:  
„ZAMENHOFA VESPERO“

*Emiliĵa Lapenna:*

## INTERPAROLO KUN LA BUSTO DE ZAMENHOF

Teatraĵo dediĉita al la 14-a de decembro

Personoj:

Voĉo de Zamenhof  
Sekretariino de esperantista organizaĵo  
Lingvoreformanto  
Fervora propagandistino  
Unua gimnaziano  
Dua gimnaziano  
Tria gimnaziano  
Laboristo  
Laboristino  
Intelektulo

Tempo hodiaŭa

Scenejo: Societa ĉambro, en la mezo staras busto de D-ro Zamenhof, bele ornamita per verdaĵoj kaj esperantaj flagoj.

SEKRETARIINO (*parolas al la busto*): Majstro, hodiaŭ denove estas via datreveno. Ĉu vi scias, ke ni jam pli ol 30 jarojn festas vian tagon. Por ni ĉiuj tio estas tre kara festo, Majstro. Sed, vidu, malfacile estas organizi vian feston. Ĉar dum tiuj 30 jaroj ni multon, multon diris pri vi. Ni pritraktis ĉion, kion oni skribis pri vi, kaj kion vi men skribis. Sed ĉio-ĉi elĉerpigis. Ĉar, Majstro, ĉu vi scias, ke la cirkonstancoj tre ŝanĝiĝis de tiu momento en la jaro 1917-a, kiam vi lasis nin. Nun oni diras, ke tiu materialo, kiun vi lasis, estas »arkaika«. Jes, viaj poemoj ne plu respondas al la hodiaŭa psiko. Vian karan poemeton »Ho, mia kor« nun deklamas infanoj, ĉar en tiu formo hodiaŭ ĝi estas plej akceptebla; la plenkreskuloj sentas sin iele ĝenitaj, deklamante tiajn poemojn. Tempo ŝanĝiĝis, ne ko-



leru, ke mi tiel parolas kun vi, sed okaze de via datreveno, mi volas esti kun vi plene sincera. Kompreneble min, malfacile estas al ni nun labori por Esperanto, malfacile propagandi ĝin, malfacile kunmetadi festotagajn programojn.

**VOĈO DE ZAMENHOF** (*Aktoro kaŝita malantaŭ la busto*): Mi scias, ke ne facile estas al vi. Kvankam mi lasis vin antaŭ tiom da jaroj, mi tamen profunde sentas ĉiun vian malfacilaĵon. Mi tiel akre suferis pro ĉiu via perdo dum la pasinta terura, dua, mondmilito. Oh! kiom dolorigis min penso pri ĉiu sanganta Esperantisto. Sed pardonu. Mi estis tro sentema, tio ne harmonias kun via tempo, mi forgesis.

**SEKRETARIINO**: Sed kara Majstro, mi petas, daŭrigu.

**VOĈO DE Z.**: Unue, ne voku min Majstro, ĉar tio ne plaĉis al mi eĉ en mia tempo kaj precipe nun tio ne sonas konvene. Neniam mi volis esti Majstro.

**SEKRETARIINO**: Mi scias, ke vi ĉiam estis eĉ tro modesta, sed kara Majstro, kiel titoli vin? Doktoro, sinjoro, aŭtoro? Ĉio-ĉi estas ankoraŭ malpli konvena ol Majstro. Vidu kiom maldankema estas al vi via kara »rondo falimia« — post 30 jaroj ni ankoraŭ ne trovis indan vorton por honorigi la memoron al via nomo. Se vi nun estus inter ni, vi estus nia kamarado — sed en via tempo kamaradoj estis malmultaj.

**VOĈO DE Z.**: O ne, tute ne, mi opiniis ĉiujn homojn miaj kamaradoj, sed en mia »arkaika« vortaro, mi diris »fratoj«. Oh! kiel varme, el plena koro mi sopiris al homa frateco!

**SEKRETARIINO**: Sed, Majstro, permesu, ke mi daŭrigu nomi vin per tiu vorto, ankaŭ nia tempo estas tre malproksima de la ideala homa frateco. Mi denove certigas vin, ke nun estas malfacila tempo kaj malfacile estas labori por Esperanto!

**VOĈO DE Z.**: Ĉu vi pensas, ke ni ne havis malfacilaĵojn? Vi hodiaŭ eĉ imagi ne povas, kiel kaj kiom malfacile ni devis batali por la plej eta sukceso. Vi hodiaŭ ne devas pruvi al homoj, ke Esperanto estas lingvo, ke oni povas paroli per ĝi. Sed ni tion devis ĉiufanke pruvadi. Al simplaj homoj, al sciencistoj, al lingvistoj. Komence, ni, tute malgranda rondeto, estis ĉirkaŭitaj nur de kontraŭuloj, eĉ en propraj familioj, kiel ekzemple en la mia, de la patro. Sed tiu mia unua rondeto, miaj kolegoj gimnazianoj, estis la plej fervora, la plej sindonema esperantista kolektivo, kiun mi vidis en mia vivo. Multe da oferemo, grandajn entuziasmojn mi vidis en mia longjara poresperanta agado, sed kiam mi rememoras miajn karajn knabojn, larmoj de ĝojo malsekigas miajn vangojn. Mi kvazaŭ vidas ilin per animaj okuloj!

(*Eniras tri gimnazianoj, vestitaj per mallarĝaj pantalonoj kaj altaj kolumoj.*)

**UNUA GIMNAZIANO**: Lazaĉjo estis hodiaŭ malbonhumora. Ĉu vi scias kia porkago denove okazis? La maljuna azeno Oslosky ekzamenis lin pri matematiko. Kompreneble, ke li sciis, li ja ĉiun objekton bone scias. Sed la maljuna kreteno ne estis kontenta. Li komencis krii: »Hje, hje, integralojn vi ne scias, kaj fari iajn stultajn lingvojn, tion vi scias, vi knabaĉo, vi stultulo, kia internacia lingvo? Ni havas la lingvon super lingvoj, la latinan, la homaro ne bezonas alian, vi idioto!«

**DUA GIMNAZIANO**: Skandalo, kaj vi nenion diris? Vi ja estas en la sama klaso kun Lazaĉjo.

**UNUA GIMNAZIANO**: Mi volis, sed Lazaĉjo tiel forte tenis mian jakon, petinte min per okuloj, ke mi nenion diru.

**TRIA GIMNAZIANO**: Ho, kial ni havas tiom stultajn profesorojn? Kiel granda helpo estus por nia kara ideo, se niaj profesoroj apogus nian agadon.

UNUA GIMNAZIANO: Lasu ilin al diablo. La ideo venkos eĉ sen illa apogo. Kaj se iu refoje atakos Lazaĉjon, mi rompos nazon al tiu impertinenta individuo.

DUA GIMNAZIANO: Knaboj, ni ŝmiru al Oslowsky seĝon per plankoleo.

TRIA GIMNAZIANO: Brila ideo, nur mi ŝmirus al li seĝon per io alia...

UNUA GIMNAZIANO: Estos bona ankaŭ oleo. Uh! kiel li kriacos! »Hji, hji, knabaĉoj, friponoj!« — sed knaboj, eĉ ne unu vorton al Lazaĉjo! Li certe ne permesus al ni fari tion, li ja estas tiom bonkora.

DUA GIMNAZIANO: Knaboj, nun ni havas lecionon pri germana literaturo. Kaj mi nenion scias. Heine, Heine (*serĉas en libro*)

Frau Venus, meine schöne Frau,  
Leb wohl mein holdes Leben,  
Ich will nicht...

UNUA GIMNAZIANO: Lasu Heine, ni kantu nian unuan kanton!

Malamikete de las naciĝs

UNUA, DUA KAJ TRIA GIMNAZIANOJ:

Kadó, kadó, jam temp'está  
(*Kantante ili foriras*).

SEKRETARIINO: Fakte estas plaĉaj viaj knaboj. Ili pretis rompi nazojn al siaj profesoroj por via ideo. Karaj, karaj knaboj!

VOĈO DE Z.: Se mi ne estus havinta en mia unua juneco tiun apogon, mi dubas ke mi havus energion pretigi nian karan lingvon. Ili donadis al mi moralan forton elteni malgraŭ ĉiuj atakoj. Sed, poste, kiam ni havis unuajn organizitajn societojn, malhelpaĵoj venadis ankaŭ el propraj vicoj. Se vi sciis, kiom da lingvoreformantoj ni havis! Ili ĉiuj pensis, ke la konstruo de la lingvo kulpas pro malrapida disvastiĝo de Esperanto. Oh, kiom da leteroj mi

skribis, kiom da diskutoj mi havis, kiom da stultaj riproĉoj mi devis rebati.

LINGVOREFORMANTO (*vestita en »salona mantelo« kun okulvitroj, streĉe rigardante en ian libron*): La Espero, hm, hm la Espero. Kial ne iló Esparó. Fakte, bonege! Iló Esparó! Vidu, kiel internaciece ĝi sonas. Artikolo la ne estis bona, finfine ĝi estas franca vorto. Sed iló, iló, iló, ha, tiu artikolo estas multe pli bona. Iló, iló, kiel bone tion elparolos ĉinoj, japanoj, ĉiuj orientaj popoloj. Jen, ĝuste en tio kuŝas malsukceso de Esperanto, ĉar tro malproksima ĝi estas de orientaj nacioj. Per ŝanĝo de artikolo la en iló — ĉio estas solvita kaj sukceso de Esperanto certigita. Certigita! Kaj kies merito ĝi estas? Mia, jes, mia. Kiam ĉiuj popoloj parolos Esperanton, sed iló mian Esparón, precipe kiam tuta Azio parolos ĝin, mi sidos dekstre de la hinda grandmoŝto, la flagoj flirtos, kanonoj tondros kaj mi modeste levos glason kaj solene donacos mian verkon al tuta homaro. Kia historia momento ĝi estos!

VOĈO DE Z.: Vidu tiajn ambiciulojn ni havis ĉiufanke. Ĉiuj ili plibonigadis la lingvon per malgrandaj ŝanĝoj, ne kompreninte, ke ĉiu granda ideo estas malrapide akceptata de la homaro. Kaj krome tiuj homoj rigardis en Esperanto nur lingvon, ili pensis, ke mi kreadis ĝin nur pro tio, ke unu franco kaj anglo povu interparoli en la sama lingvo. La interna ideo de tiu lingvo estis por mi la ĉefa instigilo en la laboro. La ideo pacigi homojn, la ideo fratigi homojn, la ideo ĉesigi batalojn inter fratoj, por tio mi laboris, por tio mi vivis.

SEKRETARIINO: Kara Majstro, ni ĉiuj scias, kiom kara estis al vi via interna ideo. Ankaŭ ni, kiuj hodiaŭ laboras por Esperanto ligas ideojn kun la lingvo, kvankam niaj ideoj iom diferencas de Via koncepto pri la Interna ideo. Ni ne vivas en idealis-

ma tempo, nia tempo estas realisma, ankaŭ niaj ideoj estas realaj. Ni ne preĝas, ni batalas por ili. Vi volis doni al la lingvo idean bazon, ni sciencan, vi volis preĝi en tempoj de homa frateco, ni pere de kultura altigo de vastaj popolamasoj esperas proksimigi homojn. Sed, Majstro, inter tiuj viaj fervoregaj propagandistoj »internaideistoj«, ekzistis ankaŭ tre strangaj estaĵoj, kiuj per sia etburĝa propagando de Esperanto pli malutilis ol helpis al ĝi.

VOĈO DE Z.: Eble el via vidpunkto ili estis strangaj, sed kedu ke sen tiuj stranguloj Esperanto tiutempe ne estus prosperinta.  
(*Eniras Propagandistino vestita en robo el la deknaŭa jarcento, ĉie grandaj steloj, sur ĉapelo verda plumo.*)

SEKRETARIINO: Oh! Majstro, kiel ridinde ŝi aspektas!

PROPAGANDISTINO: A-a-a ridinde, ĉu ne, mi aspektas? Bone, mi estu ridinda, sed ĉiuj vidas, ke mi estas Esperantistino. Miajn stelojn oni ne povas ne vidi. Bele estus meti en la butontruon unu malgrandan steleton, jes, tio aspektus eleganta, sed kiu tion vidas? Miajn stelojn, oni vidas de antaŭe, de la malantaŭa flanko, de sube, de supre, ĉie mi havas stelojn kaj oni simple devas demandi min, kion signifas tiuj steloj. Kaj tiam mi komencas propagandi, ha, kaj mi ne finas tiel baldaŭ. Mi rakontas pri miaj eksterlandaj korespondantoj, mi tuj elpoŝigas kelkajn poŝtmarkojn. La poŝtkartoj de esperantistaj korespondantoj estas veraj perloj en ĉiu filatelista kolektaĵo. Sed mi ne parolas nur pri poŝtkartoj, ha, mi havas ankaŭ pli pezajn argumentojn! Geedziĝoj! Oh! kiam mi pri tio komencas paroli, ĉiuj aŭskultas min kun malfermitaj buŝoj. Unu fraŭlino el Rumanio edziniĝis al unu svedo, kiun ŝi trovis pere de korespondado.

Neniam ili vidis unu la alian antaŭ la geedziĝo, sed ili vivas feliĉege. Centojn da similaj ekzemploj mi scias! Hm. Kelkaj stultuloj demandas min kial mi ne edziniĝis pere de Esperanto kaj kompreneble, ke mi ne povas al ĉiuj klarigadi, ke mi estas nekonkerebla fortikaĵo kaj ke mi tutan mian vivon dediĉis al propagando de nia kara ideo. Kaj mi propagandas ĝin videble, jes rigardu, tiajn stelojn oni vidas. Estu mi ridinda sed mi ne ĉesos per mia propagando. Ne, neniam! (*Foriras.*)

VOĈO DE Z.: Fakte ŝi estas ridinda kaj ŝia propagando stulta. Sed kedu, ke vi hodiaŭ multon ŝuldas al tiaj strangulinoj el mia tempo. Ili ne pretis nur portadi okulfrapajn stelojn, sed ili pretis ankaŭ malsati por Esperanto. Ili ne vespermanĝis kaj donadis tiun monon por niaj broŝuroj, kiujn ili senpage disdonadis al ĉiuj propagandcele. Mi scias, ker por vi estas malfacile kompreni tiaspecan propagandon, vi, ja, vivas en alia tempo.

SEKRETARIINO: Jes, ni hodiaŭ batalas kontraŭ ĉiuj restaĵoj de tia propagando. Ni opinias, ke propagando por Esperanto estis tro longe bazita sur tiaj poŝtmark'kaj geedziĝ'argumentoj.

VOĈO DE Z.: Ne kritiku la estintecon, ĝi ne povis esti alia. Vi havas la estontecon antaŭ vi, faru pli bone ol faris viaj antaŭuloj.

SEKRETARIINO: Ni klopodos, Majstro. Novaj homoj venas al ni ĉiutage. Junaj homoj. El ĉiuj profesioj. Multaj laboristoj, multaj intelektuloj. Ankaŭ vilaĝanoj, jes, ankaŭ ili enviciĝas, ankaŭ ili komencas senti bezonon je la Internacia Lingvo.  
(*Eniras laboristo, laboristino kaj juna intelektulo.*)

LABORISTO: Ĉu vi scias, ke ni hodiaŭ en nia fabriko skribis leteron al niaj kamaradoj en iu ĉina fabriko de sama branĉo? Kompreneble, ni uzis Esperanton. Kiel scivolema mi estas pri ilia respondo!



**LABORISTINO:** Kaj ni ricevis jam respondon de niaj svedaj kamaradoj. Legado de tiu respondo estis fakte malgranda festo en nia sindikato. Svedinoj tiel bele skribis al ni, ili priskribis tutan sian vivon en la laborejo. Ili ankaŭ invitis nin ĉiujn pasigi du feriajn semajnojn ĉe ili. Ni tuj respondis kaj invitis ilin al ni. Ni montrós al ili nian belan landon, niajn montojn, niajn lagojn, nian varman, bluan maron. En nia laborejo ni parolas pri nenio alia ol pri tiu interŝanĝo de vizitoj.

**INTELEKTULO:** Vidu, tio estas Esperanto en la praktiko. Kaj tio estas bona. Iuloke Zamenhof diris, ke li disŝirus ĉion kion li skribis pri Esperanto, se foje Esperanto servus al komercistoj por ilia korespondado. Kara Zamenhof, malmulton li sciis pri sociaj fenomenoj. Ni ĉiuj devus deziregi, ke venu kiel eble plej baldaŭ la tempo, kiam komercistoj skribos siajn sekajn, malaltstilajn leterojn en Esperanto. Ĉar estas pli ol certe, kiam foje Esperanto estos uzata en komerco, tiam ĝi ankaŭ estos uzata en scienco, diplomatio, arto, unuvorte por ĉiuj internaciaj rilatoj de homoj. Bele estos ĝisvivi tiun tempon!

**LABORISTINO:** Egale ĉu ni ĝisvivós ĝin aŭ ne, ni devas labori kvazaŭ tiu tempo morgaŭ ekestos. Se ni ĉiuj, kiuj foje komprenis la gravecon de la Internacia Lingvo laborus, persiste, tiu tempo fakte ekestus tre baldaŭ.

**INTELEKTULO:** Multaj homoj, kiuj vidas bezonon de la Internacia Lingvo, ne laboras aktive pro manko de tempo. Homoj estas nun tiom okupitaj!

**LABORISTO:** Ĉiu povas trovi senkulpigon pro nelaboro, kiu ajn volas. Eĉ akcepteblan senkulpigon. Sed se iuj povas trovi tempon por Esperanto, povus ĉiuj. Unu vesperon semajne, aŭ almenaŭ unu vesperon monate, tion povas ĉiu oferi por Esperanto. Ne ekzistas tiom okupata homo en la mondo,

kiu tion ne povus. Hodiaŭ posttagmeze ni havis sindikatan kunvenon, morgaŭ mi havos la fakan, por kiu mi devas prepari eĉ referaĵon, tamen nun mi iras al kunveno en nia esperantista societo.

**INTELEKTULO:** Se ĉiuj estus kiel vi!

**LABORISTO:** Multaj similaj ekzistas, ni trovos ilin. Iru ni, samideanoj.

**LABORISTINO:** Ni iru (*Ĉiuj foriras*).

**SEKRETARIINO:** Jen, Majstro, tiaj estas niaj hodiaŭaj propagandistoj. Sen grandaj steloj, sen grandaj vortoj. Sed ili eluzas ĉiun eblaĵon, precipe ĉiun praktikan por helpi la progreson de nia kara lingvo. Ni devas esti praktikaj, ni vivas en tia tempo, reala tempo. Ni ne preĝas, ni ne kreas filozofian koncepton pri la homaranismo. Ni batalas por plibonigo de homa vivo, ni batalas per ĉiuj rimedoj. Preĝante oni ne povas nenligi tiujn bestojn en homaj figuroj, kiuj avido sopiras buĉadon, batalojn, militojn inter homoj, por konstrui el la homa sango sian bonstaton. Ni batalis kontraŭ tiuj fortoj kaj ni batalos denove, se estos necese. Foje tiuj fortoj devos esti frakasitaj, eble tiu tempo ne estas tiom malproksima. Kaj tiam, tiam, la fratigita homaro, kiu ne plu batalos, ne plu preparos militojn, ne forgesos la Internacian Lingvon, vian lingvon, Majstro. Estu certa. Ankaŭ ni estas certaj!

F i n o.

*Prezentita dum la »Zamenhofs vespero« en decembro 1949.*

Mirko Mamužić:

VENKITA MALESPERO  
Teatra bildo el la vivo de Zamenhof

Personoj:

LUDOVIKO LAZARO ZAMENHOF  
JAKOBO  
ANTONO  
liaj amikoj  
LA PATRINO DE L. L. ZAMENHOF

Okazas en la jaro 1881, en Varsovio.

I. SCENO

(Cambro en la loĝejo de la familio Zamenhof. Meze staras tablo kaj tri seĝoj. Sur la tablo tri tasoj, teleroj, sukerujo, teujo kaj ceteraj manĝiloj. Alia meblaro laŭplaca. Ludoviko, Jakobo kaj Antono sidas ĉe la tablo kaj trinkas teon).

JAKOBO: Do vi certe ne vivis grandsinjore en Moskvo!

LUDOVIKO: Tute ne! Vi ja povas imagi: dek naŭ rubloj monate ne sufiĉas eĉ por la ĉiutagaj bezonoj.

ANTONO: Tion mi kredas kara Ludoviko. Vi multe suferis, sed vi certe havis ankaŭ gajajn horojn! Vi ja ĉiam ŝatis danci, ĉu ne?

JAKOBO: Jes, jes, kion faras la belaj moskvaninoj, vi eĉ ne unu vorton diris pri ili?

LUDOVIKO: Ho, lasu, mi vere ne havis tempon por tio.

ANTONO: Nu, nu, mi supozas, ke vi ne vivis monaĥe, konfesu!

LUDOVIKO: Sercon flanken, kamaradoj, vi ja scias, ke mi ne estas mimozo... kaj tamen, estis tre malfacile al mi.

ANTONO: Nu, mia kara Luĉjo, neniu rozo kreskas sen dornoj.

LUDOVIKO: Ĉu vi scias kio plej multe turmentis min? Vi certe kredos: la materiaj kondiĉoj, pro ili mi ja venis hejmen. Ne, amikoj miaj, mi suferis, ĉar mi vidis la samon en Moskvo, kion ankaŭ ĉe ni, en ĉi tiu malfeliĉa lando. Mi denove vidis premantojn kaj prematojn, teruran malammon inter popoloj. Mi denove vidis kompatindajn hebreojn same malestimataj kiel en niaj urboj.

ANTONO: Kion fari? Ni jam al kutimiĝis al tio.

JAKOBO: Mi aŭdis, ke vi per iaj ruslingvaj poemoj rikoltis laŭrojn.

LUDOVIKO: Laŭrojn? Ne... nur kelkajn rublojn por ne morti pro malsato.

ANTONO: Sed vi certe fariĝis cionista gvidanto?

LUDOVIKO: Ne, karaj amikoj, vi eraras. Mi konfesas, allogis min la ideo pri la cionista revekiĝo, sed min ofendas la titoloj, kiaj ekzemple »nacio super ĉiuj«, kiun oni kelkfoje alroĉis al hebreoj. Mi aspiras nur la egalrajtecon de mia malfeliĉa popolo kun la ceteraj. Kial ni devu kaŝi aŭ prihonti nian naciecon? Kial ankaŭ hebreoj ne povas havi sian propran hejmon? Ĉu neniam venos la tempo, kiam nova Moseo regvidos ĉi multesuferintan, mondlarge dissemitan popolon al la perdita Ka-naano?... Kaj se ĉi tiuj revoj neniam realiĝos, almenaŭ ni vivu kiel homoj.

JAKOBO: Vi pravas, Ludoviko!

LUDOVIKO: Neniam mi forgesos tiun spektaklon, kiun mi vidis kiel infano, ankoraŭ en Bjalistok. Preter la fenestroj de nia domo pasis kelkaj povraj, maljunaj hebreoj. Subite, polaj infanoj atakis ilin per neĝbuloj. Unu maljunulon ili trafis sub la okulon, lia vango eksangis. Kiam pro tio la mizerulo kuragiis plendi, la kristanaj knaboj kriis: »Ne bleku judaĉoj, hundoj!«, kaj sur la trotuaro ride aplaŭdis rusa leŭtenanto. »For, vi raso de ŝtelistoj! — li

rikanis kraĉinte pro malsato. Ĉu ni do ne estas homoj, ĉu ni estas vere hundoj?

ANTONO: Rigardu Ludoviko! Ni tion ĉion scias, sed kion fari? Ĉu eble ĝuste vi volas ion plibonigi? Ĉu vi sentas vin la nova Moseo?

LUDOVIKO: Ne... mi ja diris, ke mi ne fariĝis ia cionista gvidanto kaj tute ne volas fariĝi, ĉar mi same bedaŭras ankaŭ alinacianojn. Mi jam multfoje akcentis, ke mi ne rigardas la naciecon. Ĉiu rasa distingo vundas mian koron, ĉiu sociala nejustaĵo amarigas mian vivon.

JAKOBO: Ludoviko mia, vi estas tro sentema.

ANTONO: Ne konsumiĝu vane. Forlasu ĉi turmentajn pensojn, se vi ne kapablas aŭ ne volas ion fari.

LUDOVIKO: Vi ne komprenas min. Estas vere, ke mi ne strebas esti ia politika gvidanto, ĉar tuj hontindaj aferoj naŭzas min. Sed mi povus alie helpi la homaron: per mia »lingve universala«. Mi ja forlasis la laboron nur dum la studentaj jaroj.

JAKOBO: Belaj planoj, sed malfacile realigeblaj.

LUDOVIKO (*ne priatentante Jakobon*): Ĉu vi rememoras, amikoj, kiel arde ni promesis disvastigi la lingvon?... Kaj la malgrandan festeton, kiam ni la unuan fojon kantis en la nova lingvo? Kaj kio okazis? El viaj en Moskvon senditaj leteroj mi komprenis, ke ĉio estas perdita. Vi estis miskomprenataj, primokataj de pliaĝuloj, vi perdis la esperon... kaj ĉio dronis en forgeson.

ANTONO: Ludoviko, pardonu nin. Vi ja scias, kiaj promesoj sincerkore forlasis niajn lipojn antaŭ du jaroj. Ni tiam kredis, ke ni fariĝos la apostoloj de la nova lingvo. Ni tiam konstruis kastelojn en aero, ni estis idealistoj. La tempo nin kruele revenigis al realeco.

LUDOVIKO: Hm, idealismo, idealismo, ĉiam nur riproĉoj kontraŭ ĝi. Ne sufiĉas, ke mia patro dum jaroj kaj jaroj klopodis eligi el mi la reveman na-

turon, ne sufiĉas la suferoj en Moskvo, nun ankaŭ vi volas prediki pri la realeco!

JAKOBO: Ne koleru, Ludoviko, ni ja ne intencis ofendi vin.

ANTONO: Vi ja scias, kiom malfacile estis al ni, dum vi forestis. Sed ankoraŭ ne malfruas. Trovu viajn kajerojn kaj ni plifreŝigos nian scion.

JAKOBO: Jes, Ludoviko, nenio estas ankoraŭ perdita. Kie troviĝas la paperoj?

LUDOVIKO: Mia patro prenis ilin la tagon de mia forveturo. Kiom trista mi estis, kiam mi vidis malaperi la karajn foliojn en lia tirkesto.

ANTONO: Ho, for ĉi nigrajn rememorojn! Ĉio estos denove bela!

LUDOVIKO: Vi pravas, kamaradoj! Mi rehavigos la paperojn kaj ni komencos la laboron. Nun mi havas antaŭ mi du aŭ tri liberajn somerajn monatojn, sufiĉajn por ĉion tralabori. Ĉu vere, kamaradoj?

ANTONO kaj JAKOBO: Jes, Ludoviko!

LUDOVIKO: Mi ĝojas, ke revenis la malnova humoro kaj agordo. (Serĉe). Ni trinku ĉi teon por la efektiviĝo de nia komuna celo!

ANTONO kaj JAKOBO: Ni trinku!

JAKOBO (*rigardinte la murhorloĝon*): Sed nun ni devas iri, ĉu ne, Antono?

ANTONO: Jes, jam estas malfrue.

LUDOVIKO: Kien vi rapidas? Restu ankoraŭ iomete... nu, restu!

JAKOBO: Ne, ne, oni atendas nin hejme.

LUDOVIKO: Tiukaze mi cedas. Mi akompanos vin ĝis malsupre.

ANTONO (*elirante*): Serĉu la lingvaĵojn kiom eble plej frue!

LUDOVIKO (*jam ekstere, apenaŭ aŭdeble*): Jes, mi klopodos, tuj kiam revenos la patro.

## II. SCENO

(Kiam la pordo fermiĝas, malfermiĝas la alia kaj enpaŝas la patrino de Zamenhof. Ŝi proksimiĝas al la table kaj ordigas la mangilaron. Enpaŝas Ludoviko).

LA PATRINO: Ĉu jam foriris viaj amikoj?

LUDOVIKO: Jes, panjo.

LA PATRINO: Tiel rapide?

LUDOVIKO: Oni atendas ilin hejme. Mi volis reteni ilin, sed vane.

LA PATRINO: Ĉu ne, ili multe ŝanĝiĝis? Ĉu vi tuj rekonis ilin?

LUDOVIKO: Apenaŭ. Ili fariĝis veraj viroj. Pasas ja la tempo.

LA PATRINO: Nu, ankaŭ vi ne estas plu knabo. Kiel mi ĝojas, ke mi havas tiom grandan filon... studenton de medicino.

LUDOVIKO: Panjo!

LA PATRINO: Mi petas?

LUDOVIKO: Ĵus mi pritraktis kun la amikoj nian karan lingvoprojekton. Kien metis mia patro la paperojn? Nun mi havas tempon por ĉien trarigardi.

LA PATRINO (silente deturnas la rigardon de Ludoviko):

LUDOVIKO: Patrineto, vi silentas? Kio okazis?

LA PATRINO (sidiĝas, prenas naktukon kaj viŝas siajn larmojn).

LUDOVIKO: Vi ploras! Kion signifas tio? Panjo!... Ĉu pro mia skribaĵo vi ploras?... Ho, mi komencas kompreni. Ne ekzistas plu miaj paperoj, ĉu ne, panjo?

LA PATRINO (plore kapneas).

LUDOVIKO: Aj...

LA PATRINO: Ne koleru, mia filo, mi petegas vin. Via patro ja volis nur bonon... li ĉiam volas nur bonon por vi.

LUDOVIKO (sidiĝas kaj klinas kapon).

LA PATRINO (ekstaras, iras al Ludoviko kaj karesas lian kapon): Ho, Ludoviko, pardonu al via patro. Li faris tion nur el patra amo, mi ĵuras al vi. Li kredis, ke li savos vin tiel, ĉar li aŭdis de multaj, ke vi estas endanĝerigita pro viaj fantaziaj planoj... Mi petegis lin, sed vane... Kiom mi ploris, ho kiom mi ploris! Mi treme pensis pri la momento, kiam vi ekscios la veron... Sed ne malesperu, vi ja scias ĉion parkere, vi ne povis multon forgesi. Ne malesperu, Ludoviko, kaj supren la kapon! (Levas lian kapon kaj kisas lian frunton). Kuraĝon, Ludoviko!... Mi kuro al vi ankoraŭ unu tason da teo, ĉu?

LUDOVIKA: Jes, mi petas, panjo.

LA PATRINO (prenas unu tason kaj foriras viŝante siajn larmojn).

## III. SCENO

(Ludoviko sola)

LUDOVIKO: Detruita, ĉio estas detruita!

Forbrulis miaj karaj paperoj... kaj kun ili ankaŭ miaj planoj. Laboron de sennombraj tagoj forglutis flamoj. Kiom ironia estas la sorto: ankoraŭ antaŭ kelkaj minutoj mi sentis min riĉa, ekstreme riĉa. Mi kredis posedi trezoron, ĉiu paĝo de miaj kajaĵoj ŝajnis al mi juvelo. Kaj nun?... Nun mi estas mizera almozulo.

(Kun kreskanta kolero). Kial devis tio okazi? Kial? Kial mi devas havi tiom severan, strangan, stultan patron? (Konsciigas pri tio, kion li diris). Ne, tiel mi ne devas paroli, mi ne rajtas insulti lin, kiu nutras min, mi... nedankema infano. Li ja volis nur, ke mi ne fariĝu revema pupeto, sed homo kapabla stari sur siaj propraj piedoj.

(*Nervozе promenas en la ĉambro*). Ha, pravis miaj amikoj: tro sentema mi estas, tro idealisma. Certe ridos la kamaradoj, kiam ili ekscios la novaĵon. Kia honto!... Jes, ili pravis. Do, mi estu ordinara kuracisto, simpla, ĉiutaga, kiu elsuĉos el siaj pacientoj plej-eble multe da mono, kies sola zorgo estos kreskigi sian ventraĉon, sufiĉe ripozi kaj agrable distriĝi. Kial oferedoni min al la nedankema homaro? Ĉu iu komprenos min? Kial min interesi la vekrioj de la subjigitaj popoloj, la suferado de povruloj? Kial min ekscitu, se stratbuboj vundas mizerajn maljunulojn, se policistoj fortrenas senkulpulojn al karceroj?

Tamen... ne estas tiel, mi sentas, ke mi ne pravas. Mi dezirus altrudi al mi mem ion kontraŭnaturan, ion, kio ne venas el mia koro. Kial surmeti pezan maskon, kiam ĝia ĝismorta portado ne eblas?

Ne, ne kuŝas ĉi tie la solvo. Ankoraŭ sonas en miaj oreloj la patrinaj vortoj: »Ne malesperu, vi ja scias ĉion parkere, vi ne povis multon forgesi«. Jes, patrino, vi pravas! Kiel sonas la himno?

Malamikéte de las nácjes  
Kadó, kadó, jam temp' está,  
La tot' homóze in familje  
Konunigáre so debá.

Mi forgesis nenion! Forbrulis la paperoj, sed ne la planoj. Mi estu la fabela fenikso, kiu reviviĝis el siaj propraj cindroj. Hodiaŭ mi repostulos de mia patro la promeson ne okupiĝi pri la »uniwersala lingvo«, kaj tiam mi estos libera. Mi laboros tage kaj nokte, sekrete, parolante pri ĝi al neniuj, eĉ ne al miaj kamaradoj, ili ja nur seniluziigis. Mi poluro mian verkon ĝis la fino de mia studado, kaj tiam... tiam mi, simile al Cezaro, transpaŝos la Rubikonon!

## IV. SCENO

(*Venas la patrino de Zamenhof kun teo*).

LA PATRINO (*tute ne rigardante lin*): Jen, filo mia, mi alportis la teon... (*Rimarkas Ludovikon*). Kion mi vidas! Ludoviko, ĉu vi ridetas? Ĉu vi vere ridetas, infano mia? (*Demetas la teon*).

LUDOVIKO: Jes, panjo. Mi koleris, mi furiozis, sed mi venkis min mem, kaj tio pli multe valoras ol venki tutan armeon. Mi venkis la malesperon. Mi vidis, ke mia patro eraris, kiam li detruis tiom da surpaperigita peno, sed mi ankoraŭ pli multe erarus, se mi malesperus. Mi vidas, kara panjo, ke vi pravas, kiel vi pravis jam milfoje dum mia infanaĝo. Jes, panjo, mi levos la kapon!

LA PATRINO: Fileto, se vi scius, kiom ĝojigas min la reapero de via rido, de via gajeco! Ek al la laboro, ĉar nur laboro kaj pacienco gvidos al la plenumiĝo de viaj revoj. Ne forlasu viajn belajn idealojn kaj vi sukcesos. Promesu tion al mi, Ludoviko!

LUDOVIKO: Mi promesas, kara patrino! (*Kisas ŝian manon*).

## FINO

*Prezentita dum la »Zamenhofa vespero« en decembro 1950.*

Shertse Mulo:

## INTERNACIA KISO

Personoj:

Petro Vulić, juna jugoslava esperantisto  
Suzana Vivier, franca esperantistino  
Alfredo Johnson, amerika esperantisto  
Anne Baker, lia amikino kaj kunvojaĝantino.

Okazas en iu ajn jugoslavia urbo. Ĉambo kun dekstra kaj maldekstra pordoj. Memblaro laŭplaĉa.

PETRO (sola): Ho kiel malpacienca mi ostas, Fine mi vidos ŝin, mian francan korespondantinon. Kia feliĉo, ke la kongreso okazos en nia lando, tiel ni povos renkontiĝi. Nur se mi almenaŭ scius, kiel ŝi aspektas. La bildo, kiun ŝi sendis estis farita antaŭ kelkaj jaroj. Tiam ŝi estis ankoraŭ knabino — sufiĉe plaĉa knabino. Sed-kien mi metis la bildon? Ha jen, ĉi tie ĝi estas! Ho karulino mia (li kisas la bildon). Kaj kiajn leterojn ŝi skribis, kiel perfekte ŝi majstras la lingvon! Estos ĝuo paroli kun ŝi.

SUZANA (de ekstere frapas la pardon).

PETRO: Tio estas ŝi. Bonvolu eniri!

SUZANA: (duone malfermas la pordon kaj enŝovas la kapon): Ĉu sinjoro Vulić?

PETRO (rapidas al la pordo): Ĉu fraŭlino Vivier?

SUZANA (eniras, ridinde vestita, kun multe da verdaĵo, steloj, eĉ flageto en la mano. Parolas kun intensa franca prononco kaj malkorekte): Peĉjo, kara Peĉjo! Fine ni rekontiĝis! (Ŝi volas ĉirkaŭbraki lin.

PETRO: Ho, ve!

SUZANA: Kio estas tio Peĉjo? Ĉu vi ne ĝojas ke mi venis?

PETRO: Eĉ kiel! Mi fakte ĝojegas... nur subite spasma ekkaptis mian piedon.

SUZANA: Vian piedeton? Oh, c'est ennuyant'... Doloras? Ke mi helpu?

PETRO: Ne, ne, nur sen ia ajn ĝeno! Jam ĉio en ordo. (Duonlaŭte) Kia monstro!

SUZANA: Monstro?

PETRO: Pri mia piedo mi parolas... ĝi estas monstro.

SUZANA: Ah, j'en suis fâché (Sidiĝas).

PETRO (ne sciante kion fari): Kara Suzana, rakontu ion!

SUZANA: Oh, mi iras rakonti multe, multe, seulement... unue mi devas demeti mia mantelo, ien loki mia kofreto.

PETRO: Ho, pardonu, mi ne rimarkis, ke vi ankoraŭ nenion demetis! Mi estas tiom konfuzita... pro la grandega ĝojo, kompreneble (helpas ŝin).

SUZANA: Tio mi kredas. Ho, Peĉjo kiel mi amas vin! Viaj leteroj vekis en mi une sympathie sincère por vin...

PETRO: Fulmotondro!

SUZANA: Mi petas?

PETRO: Mia piedo! Ĝi ankoraŭ doloretas.

SUZANA: Tio forpasos apud mi. Tio forigos la balzamo de nia reciproka sympathie.

PETRO: Apenaŭ kredeble!

SUZANA: Oh, mon Peĉjo (ŝi intencas ĉirkaŭbraki lin)

PETRO (retiriĝas) Pardonu, nur rimarketon mi volis diri al vi... Mi opiniis, ke vi scipovas pli bone Esperanton, kara Suzana!

SUZANA: Ha, ha, ha. Mi iomete trompis vi. Mi skribis me lettres en français kaj mia amikino tradukis ili en Esperanto.

PETRO: Diablo!

SUZANA: Surprizita, hm? Vi-kredis, ke mi estas pli juna, ĉu ne? Nu, sed kelke jaroj ne estas grava. Vi certe ankaŭ kredis, ke mi estas plus jolie. Sed miaj gepatroj estas riches, tres riches. Mi rakontos pri ili multe, tre multe kaj pri niaj hundoj, kaj



pri niaj chevaux, kaj pri niaj aŭtoj kaj pri nia palais kaj pri mia onklo le marquis de Salpêtrière kaj...

PETRO: Bone, bone sed unue vi tamen devas vidi la ĉambron kie vi loĝas.

SUZANA: C'est vrai, unue la chambre... Miaj gepatroj sentas por vi une sympathie sincère...

PETRO: Bone, bone venu! (*Forkondukas ŝin*).

SUZANA (*irante*): Vos lettres...

PETRO: Suzana poste pri tio, poste!

SUZANA (*jam de ekstere*): Ma sympathie...

ANNA kaj ALFREDO frapas la pardon kaj eniras.

ALFREDO (*tipa malvarmsanga amerikano, kun pipo en la buŝo, scias nur malmulte Esperanton*): Nobody.

ANNA (*plaĉa, vigla fraŭlino, bonega esperantistino*): Ĉu neniu? Fakte neniu! Halo!

ALFREDO: Hello, anybody in?

ANNA: Well, let's see (*Ambaŭ eliras*).

PETRO (*eniras*): Jen mi jam kuras! Ĉu neniu? Mi kredis aŭdi homajn voĉojn. Certe mi haluciniĝis... ja ne estas mirige. Kiu povus suspekti, ke la plaĉa kabineto de la foto, ke la skribinto de tiel ĉarmaj leteroj aspektos tiel terure? Kion mi faru pri ŝi? Nun ŝi sidos sur mia kolo unu tutan semajnon kaj mi devos akompani ŝin ĉien. Kion diros la homoj, se ili vidos tiun verdan fanatikulinon kun mil steletoj kaj flagetoj? Kaj kion ili diros kiam ŝi malfermos sian buŝon? Hm, hm... ŝiaj riĉaj gepatroj! Kiel utilas riĉaj gepatroj, se la filino estas rinocero? (*Li ne rimarkas ke Anna kaj Alfredo eniris*). Ĉu mi povas al ŝi diri... kara rinocero... patose turniĝas al Anna kaj diras la lastajn vortojn al ŝi).

ANNA (*kun rideto*): Ĉu mi?

PETRO: Ho pardonu, mi tute ne rimarkis, ke mi ne estas sola.

ALFREDO paŝas antaŭen: My name is Johnson. Alfred Johnson from New York. Mia amikino Miss Anna Baker.

PETRO: Mi ĝojas. (*Manpremas kun ili*). Mia nomo estas Vuliĉ. Ĉu ankaŭ vi estas esperantistino, kara fraŭlino?

ANNA: Ĉu »ankaŭ« vi diras? Centoble pli bone ol li!

PETRO: Ho perfekte! Bonvolu eksidi gesinjoroj.

ALFREDO: Ho thank you, ni devas iri. Ni nur deziris eksci de vi the address of Mr. Ŝimunoviĉ (*prononcas la nomon malklare*).

PETRO: Kies adreson mi petas?

ALFREDO: Just a moment please. (*Serĉas en sia poŝo*) Rigardu, please!

PETRO: Ŝimunoviĉ. Jes, jes tuj mi diros al vi kie li loĝas. Li loĝas en ĉi tiu strato Numero 53.

ALFREDO: Thank you, Sir!

PETRO: Kiel vi sciis, ke mi loĝas ĉi tie?

ANNA: Oni diris al ni surstrate, ke ĉi tie loĝas konata esperantisto, kiu certe scios la adreson de sinjoro Ŝimunoviĉ kaj ni venis supren.

PETRO: Nu, ne rapidu tiel, por ke ni babilu iomete.

ANNA: Fakte, Alfredo, la sinjoro pravus. Ni, ja, povas resti kelkajn minutojn.

ALFREDO: Ne, ni devas iri. Let's go, Ann.

ANNA: Nu Alfredo, ne estu tia!

ALFREDO: Pardonu, mi devas nepre iri. Sed vi povas resti, se vi deziras.

ANNA: Ĉu vi lasos min ĉi tie, kaj foriros?

ALFREDO: Kio fari se vi volas babili. Sed baldaŭ mi revenos. Ĝis la revido!

ANNA: Sed Alfredo!

(*Alfredo ne aŭskultante ŝin, eliras.*)

ANNA: Terura homo!

PETRO: Iom nervoza.

ANNA: Tro nervoza... sed, pardonu sinjoro, mi ne komprenis klare vian nomon.

PETRO: Petro Vuliĉ.

ANNA: Ho, vi estas samideano Vuliĉ! Mi jam legis multe pri vi en la gazetoj. Kia ĝojo paroli kun vi!

PETRO: Ankaŭ mi ĝojas paroli kun tiel bona kaj ĉarma esperantistino. Sed unue bonvolu preni lokon kaj permesu, ke mi forportu vian valizon en la antaŭĉambron.

ANNA: Ho, dankon (Petro eliras). Kiel ĝentila knabo! Tute alia ol Alfredo.

PETRO: revenas: Kaj nun, kara fraŭlino, rakontu al mi pri via vojaĝo!

ANNA: Nu, ni forveturis el Romo ĝuste antaŭ unu semajno...

PETRO: El Romo? Ĉu vi ne venis rekte el Ameriko?

ANNA: Ho, vi devas scii, ke mia patrino estis denaska italino. Ŝi mortis antaŭ du jaroj. Do, mi vizitis mian prapatrujon. Ni vivas nun en Novjorko.

PETRO: Kaj ĉu vi vojaĝis ĉi tien kune kun sinjoro Alfredo?

ANNA: Jes. Li estas amiko de mia patro.

PETRO: ... kaj eble via fianĉo?

ANNA: Ne, almenaŭ ne ankoraŭ. Nu, vere, mia patro deziras, ke mi edziniĝu al li. Li amas min, kvankam li ne scias tion montri. Li havas tiel stragan kondutmanieron. Nun, kiam li foriris de vi, mi devis refoje honti pro lia krudeco. Kion vi pensis pri li!

PETRO: Nenion mi pensis, mi certigas vin. Certe li estas laca da le vojaĝo.

ANNA: Ho ne, ĉiam li estas tia. Li estas bankoficisto, kiu scias manipuli nur monon, sed ne homojn!

PETRO: Mi konstatas, kara fraŭlino Baker...

ANNA: Nomu min simple Anna!

PETRO: Mi konstantas, kara Anna, ke vi perfekte regas Esperanto!

ANNA: Jes, mi ellernis ĝin de mia povra patrino. Ŝi propagandis la internacian lingvon plej fervore

dum dudek jaroj. Mi montros al vi ŝian bildon, nur... ĝi troviĝas en la valizo.

PETRO: Tuj mi alportos vian valizon!

ANNA: Ne, ne, restu, mi iros mem (*eliras en la antaŭĉambron*).

PETRO sola: Kiel ĉarma virino. Mi devas konfesi, ke ŝi konkeris mian koron ekde la unua momento. Kaj kiel ŝi parolas Esperante! Tute alie ol tiu kompatinda rinocero. Nur ne veno nun Suzana, ĉar tiam mi troviĝos en bela kaĉo.

SUZANA enkuras: Peĉjo, jen mi estas preta!

PETRO: Sep sakramentoj! Ne venu... reiru... oj, oj!

SUZANA: Qu'est ce que c'est? Ĉu denove via piedo?

PETRO: Ne, ĉi tie troviĝas unu el miaj... el miaj amikoj.

SUZANA: Kaj vi ne ĝojas?

PETRO: Ne, ĉar tiu amiko turmentas min pro stultajo. Li... li deziras perforte, ke mi recitu dum la kongreso lian poemeton. Ho, mi estas tiom nervoza!

SUZANA: Oni ne devas esti tuj tiom nervoza. Mi parolos kun lin, mi persvados li. Kie li estas?

PETRO: Ne, ne, ne. Neniuokaze. Mi men persvados lin. Mi montros al li (*Prenas ŝin je la mano*). Nur iru en vian ĉambron, tuj mi elĵetos mian amikon.

SUZANA: Elĵeti amiko? Ho, Peĉjo, kiel kruela vi estas Certe li estas sympathique.

PETRO: Kion fari se li turmentas min. (*Eligas ŝin el la ĉambo*) Mi komencas ŝviti. Diable, kiel varma situacio! Mi ja ne povas permese, ke Suzana malhelpu miajn manovrojn ĉe Anna.

ANNA eniras: Jen, mi trovis la bildojn.

PETRO: Montru ilin, Anna!

ANNA: Tio estas nia domo ĉe la marbordo, 60 mejlojn sude de Novjorko.

PETRO: Kiel bela domo!

ANNA: Tio mia patro, kaj tio mia povra patrino.  
 PETRO: Plaĉaj bildoj.  
 ANNA: Kaj via familio? Ĉu vi havas ankaŭ gepatrojn?  
 PETRO: Jes, sed mia patrino forvojaĝis por viziti la avinon. Ŝi revenos nur post du semajnoj.  
 ANNA: Sed mi ĵus aŭdis ian virinan voĉon.  
 PETRO: Ĉu virinan voĉon?  
 ANNA: Jes, iu parolis kun vi.  
 PETRO: Ha, tio estis nia servistino.  
 SUZANA el la apuda ĉambro: Peĉjo, tamen mi venas helpi vin. (*Malfermas la pordon.*)  
 PETRO (*revenas*): Cent mil bomboj! (*Fulmorapide kuras al la pordo, elŝovas Suzana tiel ke Anna ne vidu ŝin kaj eliras.*)  
 ANNA (*sola*): Kio okazas ĉi tie? Tio estas stranga! (*Iras al la pordo kaj subaŭskultas.*) Nenion mi aŭdas... Mi ne komprenas kio povis tiel nervozigi Petron. Sed ion mi devas tamen konfesi: mi enaĝis al ĉi tiu bubo.  
 PETRO (*revenas*): Pardonu, kara Anna, tiu rinocero ĉiam turmentas min.  
 ANNA: Rinocero? Ha, nun mi memoras, ke vi parolis pri ia rinocero kiam mi enpaŝis kun Alfredo.  
 PETRO: Nome... mi nomas rinocero la servistinon, ĉar ŝi ĉiumomente vokas min pro io.  
 ANNA: Kion ŝi volis?  
 PETRO: Mia patro bezonis min...  
 ANNA: Via patro? Ĉu li estas hejme?  
 PETRO: J-j-jes.  
 ANNA: Prezentu min al li, mi petas. Mi deziras konatiĝi kun li. Iru ni! (*Iras al la pordo kaj malfermas ĝin.*)  
 PETRO: kuras post ŝi kaj retiras ŝin: Ne nun, ne nun!  
 ANNA: Petro, vi estas konfuzita!  
 PETRO: Kontraŭe, mi fartas ĝuste bone.  
 ANNA: Ne, ne, vi estas konfuzita. Kio okazas ĉi tie?  
 PETRO: Jes, Anna, mi konfesas... mi estas konfuzita.

Mi devus nun ion malkaŝi al vi, sed mi ne kuraĝas.  
 ANNA: Nu diru, diru.  
 PETRO: Ĉu vi ne priridos min?  
 ANNA: Ne, mi certigas vin.  
 PETRO: Ĝis nun mi ne kredis, ke oni povas enamiĝi dum kelkaj minutoj, sed nun mi spertis tion. Anna, mi amas vin!  
 ANNA: Kion vi diras?  
 PETRO: Mi amas vin!  
 ANNA: Petro!  
 PETRO: Restu ĉe mi!  
 ANNA: Petro! (*Ĉirkaŭbrakas lian kolon. Petro ĝuste prepariĝas kisi ŝin, kiam enpaŝas Suzana.*)  
 SUZANA: Mi persvados li... ho, Peĉjo, kio mi vidas!  
 PETRO (*saltleviĝas embarasite*): Suzana, ĉi tiu fraŭlino estas mia amerika amikino, kara Anna, ĉi tiu fraŭlino estas mia franca korespondantino.  
 ANNA: Tio estis ŝia voĉo, kiun mi aŭdis antaŭ kelkaj minutoj kaj vi parolis pri via servistino.  
 SUZANA: Do, ŝi estas tiu kruelkora amiko! Kongresa recitado, persvado per kisoj... Mon Dieu, kion mi devis ĝisvivi.  
 ANNA: Kio estas tio? Mi nenion komprenas!  
 SUZANA: Ĉu vi ne plu amas min Peĉjo. Ma sym-pathie...  
 ANNA: Kion ŝi diras? Ĉu pri amo ŝi parolas? Nun al mi estas ĉio klara. Sinjoro Petro, vi trompis nin ambaŭ.  
 PETRO: Sed Anna!  
 ANNA: Mi ne kredis, ke sub tiel horesta vizaĝo povas kaŝiĝi fripona animo.  
 SUZANA: Fraŭlino ne ofendu mia amanto! Li amis nur mi kaj vi delogis li.  
 PETRO: Sed Suzana!  
 ANNA: Fraŭlino, mi estas honesta kaj neniun delogis ĝis nun en mia vivo kaj por tion pravi mi foriras. Adiaŭ sinjoro Vuliĉ por ĉiam. (*Ekliras al la pordo.*)

PETRO: Miskompreno, miskompreno, kara Anna. Mi klarigos al vi ĉion.

ANNA: Vi devas nenion klarigi! Mi havas okulojn.

PETRO: Mi certigas vin, ke tio estas malfeliĉa kaj tute hazarda ludo de la sorto. Mi petas vin, restu nur unu minuton!

SUZANA: Kial ŝi restu? Peĉjo, mon amour, elektu kiu vi pli amas el ni du.

PETRO: Sed Suzana, kia demando!

SUZANA: Elektu, elektu!

ANNA *iras decideme al la pordo*: Mi ne ĝenos plu vian feliĉon!

PETRO: Anna (*kuras post ŝi*), revenu, mi petegas! Ĉu vi ne vidas ke ĉion kaŭzis Suzana pro sia malprudenta ĵaluzo?

SUZANA: Tiel vi parolas pri mi? Oh Peĉjo... Ah, mon Dieu! ... mi perdis mia jugoslava amiko, mia esperanta amanto... mi vidas, ke vi elektis ŝin (komencas plori). Vi piedpremis ma sympathie sincère. Mi ne havas plu io serĉi ĉi tie... en ĉi tiu domo (eliras plorante).

PETRO krias post ŝin: Suzana ne ofendiĝu, ne infanu! Ŝi foriris, rinocero, belan pasteĉon ŝi bakis por mi.

ANNA: Vi mem bakis ĉi tiun pasteĉon kaj nun formangŭ ĝin. Adiaŭ (*Denove iras al la pordo*).

PETRO: Anna, revenu nur por momento! Komprenu, ke ŝi ne estas mia amatino. Ŝi estas neebbla kreaĵo. Mi ne amas ŝin kaj neniam povus ami ŝin. Ĉu vi vidas kiel ridinde ŝi estas vestita? Kiel vi povis supozi ke mi edziĝos al ŝi?

ANNA silantas.

PETRO: Ŝi parolis al mi amplene, eble ŝi amas min-la povra knabino-sed kion fari? Mi devas ŝin toleri en la domo, ni du ja korespondas delonge. Sed sciu, ke ŝi trompis min. Ŝi sendis al mi antaŭdilu-van foton pri si kaj skribigis korektlingvajn lete-rojn pere de sia amikino. Mi kredis, ke ŝi estas

ĉarma kaj prudenta kaj hodiaŭ, kiam ŝi venis, mi ekvidis kia ŝi fakte estas.

ANNA: Mi tamen ne kredas al vi. Kial vi sekretumis pri ŝia ĉeesto, kial vi mensogis pri via patro kaj servistino, kial vi ne kondutis sincere al mi?

PETRO: Ĉar mi ne volis ke vi renkontiĝu, timante ion similan al tio, kio fakte okazis. Mi intencis forsendi ŝin iamaniere diplomate, por ke mi ne rompu ŝian koron. Ŝi ja estas delikatanima kaj naiva kvazaŭ infano. Ho, Anna, kredu al mi! Mi amas vin el mia tuta koro. Lasu la stultaĵojn kaj restu ĉe mi!

ALFREDO *frapas kaj eniras*: Bonan tagon, mi revenis. Mi kredas, ke vi sufiĉe babilis, ĉu ne? Ann shall we go now?

ANNA *rigardante signifoplene Petron, post paŭzeto*: No, darling!

ALFREDO: Mi ne havas plu tempo!

ANNA: Vi ne devas havi... Mi restos ĉi tie!

PETRO: Kion mi aŭdas?

ALFREDO: I don't understand.

ANNA: Mi restos ĉi tie por ĉiam, ĉe ĉi tiu sinjoro (*montras Petron*).

ALFREDO: What?

ANNA: Sinjoro Vuliĉ amas min, mi amas lin — kaj tio sufiĉas! (*Petro kuras al ŝi kaj ĉirkaŭbrakas ŝin*).

ALFREDO: I see... kaj la bileto? Mi jam pagis la re-veturon?

PETRO: Sinjoro Johnson, mi havas iom da ŝparita mono, mi pagos la bileton de Anna. Ĉu vi konsentas?

ALFREDO: O. K. ... Tiam mi havas plu nenion serĉi ĉi tie.

SUZANA *eniras kun kofro kaj mantelo*: Kara Peĉjo, mia koro sangas sed mi tamen forlasas vi senkole. Mi sentos por vin ankaŭ plue une sympathie sincère... (*duonplore*). Vivu feliĉe kun via ameri-

kanino. (*Rimarkas Johnson*) Ho, mi tute ne rimarkis ĉi tiun sinjoron.

ALFREDO: Alfredo Johnson. How do you do?

SUZANA (*ĉesas plori kaj gajigas*): Oh, vous êtes un Anglais? Quel bonheur! Mi iros kun vi! (*Kuras al li*).

ALFREDO: Stop, stop please! (*Ekzamenas ŝin dekape ĝispiede*).

SUZANA: Kio vi rigardas? Ah, mi komprenas. Sinjoro, mi ne estas bela, sed mi havas riĉaj gepatroj, tre riĉaj gepatroj.

ALFREDO: Riĉaj gepatroj? OK, come on then! (*Tiras ŝin eksteren*). Ĝis revido. Sinjoro Vuliĉ, good bye, Ann... mi volus ankoraŭ ion diri al vin: ne kredu ke mi ne amis vin!

ANNA: Oh, Alfred, poor boy. I'm sorry!

ALFREDO: Never mind! (*Al Suzana*) Come on, come on! (*Eltiras ŝin*).

SUZANA (*el la pordo*): Adiaŭ Peĉjo, malhonesta bu-baĉo. Mi trovis pli bona fianĉo (*foriras*).

ANNA: Eble mi agis maljuste kontraŭ Alfredo.

PETRO: Lasu Alfredon, li trovis por si iun alian. Mono aĉetas ĉion. Ĉefas, ke ni restis solaj.

ANNA: Ĉu ni estas fakte solaj? (*Kuras al la pordo kaj rigardas en alian ĉambron*).

PETRO: Ha, ha, mia eta diablino, ĉu vi eble atendas la elpaŝon de alia Suzana el tiu ĉambro? Ne timu, nun vi estas sole la mia!

ANNA (*ĉirkaŭbrakante lin*): Sole la via!

PETRO: Kaj nun venas la plej bela momento de ĉi tiu tago — kiso arda kaj...

ANNA: Internacia! (*kiso*).

*Prezentita dum la »Zamenhofa vespero«  
en decembro 1952*

*Shertse Mulo:*

## TROA SCIVOLEMO

Personoj:

Paŭlo, sekretario de esperantista societo

Joĉjo } deĵorantoj

Viĉjo }

Manjo, esperantistino

S-ino Natalio, dommastrino, scipovanta Esperanton.

Okazas en klubejo. Granda malordo. La tabulo estas preskaŭ blanka kun diversaj desegnaĵoj. La seĝoj kovritaj de polvo. Surplanke ŝakfiguroj, alumetoj, cidro kaj cigaredrestaĵoj.

### I. sceno

PAULO (*Promenas nerveze kaj parolas al la deĵorantoj*): Vidu, vidu, kiaj vi estas! Ĉu mi ne emfazis jam centfoje, ke oni ne devas malfermi la poŝtajon de la Ligo kaj de la Federacio? Mi trovas ĉiam ĉiujn sendaĵojn malfermitaj kaj kontrolitaj per ia tro scivolema mano. Ĉu ĉi tio estas disciplino? Kaj kiam mi demandas, kiu tion faris, tiam vi ĉiuj rigardas unu la alian kaj silentas. Tio estas simpla konspiro!

JOĈJO: Sed samideano Paŭlo...

PAULO: Nu, ne senkulpigu vin. Mi scias kion opinii pri vi, pri niaj karaj deĵorantoj. Kiel vi povas esti tiel scivolemaj? Ĉu tio estas bela?

JOĈJO kaj VICJO: Ne, certe ne, sed...

PAULO: Ĉu vi konscias pri tio, ke troa scivolemo estas hontindaĵo? Ĉu vi ne hontas malfermi leterojn de iu alia? Kion vi dirus se oni malfermus la viajn? Rigardu min kaj respondu: kiam vi vidis min malfermi kaj kontroli neproprajn poŝtaĵojn?

VICJO: Vere neniam ĝis nun.

PAULO: Krome... krome, kia malordo regas ĉi tie! Ĉie polvo, malpuraĵoj; surplanke cigaredrestaĵoj kaj cindro, alumetoj kaj ŝakfiguroj; la tabulo estas blanka. Kiu faras ĉion tion? Kion dirus eksterlandano veninte ĉi tien? (*Konsciigante pri tio, kion li diras, flanken*). Ha, eksterlandano. Brila ideo! Mi havas bonegan planon. Mi venĝos min al tiuj du friponoj! (*Laŭte*) Do tiel. Sed nun mi devas foriri. Laŭeble faru ordon ĉi tie kaj ne malfermu plu fremdajn leterojn. Ĝis la!

JOĈJO kaj VICJO: Ĝis la. (*Paŭlo eliras*).

## II. sceno

JOĈJO: Fu, kia prediko!

VICJO: Kia vortlavango!

JOĈJO: Mi apenaŭ eltenis.

VICJO: Kompreneble, ke li iomete pravis. Estas fakte malordo ĉi tie.

JOĈJO: Nu, kaj kion vi diras pri la malfermita letero?

VICJO: Pro ĝi ja vi kulpas!

JOĈJO: Mi? Kial mi?

VICJO: Estis ja via ideo malfermi ĝin!

JOĈJO: Bone, bone, mia ideo. Sed vi efektivigis ĝin.

VICJO: Do vi eble deziras diri, ke mi kulpas?

JOĈJO: Kaj vi deziras diri, ke mi kulpas?

VICJO: Ĉe la fino montriĝos ke mi estas pli scivolema ol vi!

JOĈJO: Kompreneble, ke vi estas pli scivolema!

VICJO: Por satigi vian grandan scivolemon vi instigis min manĝi el la »malpermesita frukto!«

JOĈJO: Kaj denove pro mia scivolemo vi ekmordis la saman frukton kun la plej granda ĝuo, ĉu ne?

VICJO: Kompreneble!

JOĈJO: Do, laŭ tio mi kaŭzis ĉion.

VICJO: Kompreneble!

JOĈJO: Eble mi faris ankaŭ malordon ĉi tie?

VICJO: Komp... nu... eble!

JOĈJO: Jen al vi, fripono! (*Jetas ŝakfigurojn kontraŭ Vicjon. Intertempe eniras Manjo*).

## III. sceno

MANJO: Kio okazas ĉi tie? Halt', halt'.

VICJO: Guste bone, ke vi venis; Joĉjo furiozas hodiaŭ.

MANJO: Mi nenion komprenas. Mi renkontis mal-supre nian sekretarion, li ŝajnis esti iom malbon-humora. Vi du kverelis. Kio okazis finfine?

VICJO: Paŭlo akuzis nin pro scivolemo, ĉar mi malfermis la leteron adresitan al la Ligo. Nun Joĉjo asertas, ke mi kaŭzis la tutan konfuzon kaj eĉ la malordon, kiu regas ĉi tie.

JOĈJO: Estas tute klare, ke vi kaŭzis ĉion! (*Intencas denove ĵeti ŝakfigurojn*).

MANJO: Halt', stultuloj, ne disputu! Kial vi batalas kiam vi nun devus agi konkorde kaj venĝi vin al Paŭlo? Scivolemo — nu, scivolemo estas malbelaĵo, mi ankaŭ malŝatas ĝin...

JOĈJO (*Tusas*): Hm... hm...

VICJO: La anĝelino!

MANJO: ...sed ja eĉ nia sekretario ne estas senmakula koncerne tion. Venu ĉi tien por ke mi proponu ion!

JOĈJO kaj VICJO (*ankoraŭ malamike rigardas unu la alian kaj hezitas alproksimiĝi al Manjo*).

MANJO: Nu venu! (*Ili alproksimiĝas*) Prefere... prefere ni forĝu trafan venĝon!

JOĈJO: Bona ideo!

VICJO: Fakte bona! Nun mi vidas, ke ankaŭ knabinoj povas havi kelkfoje saĝajn ideojn.

MANJO: Ĉi! Se Vi tiel aĉe mistaksas min, tiam mi nenion diros.

VICJO: Diru, diru!

JOĈJO: Ne ofendiĝu tiel rapide; ni ja scias, ke Vi estas ruza vulpino.

MANJO: Do, aŭskultu! Ni lasos ĉi tie leteron odresitan al la Federacio kaj de ie kaŝitaj, observos...

JOĈJO: Ni observos, kion faros pri ĝi lia sekretario moŝto! Brile.

MANJO: Jes, kaj tiam ni donos al li lecionon!

JOĈJO: Bonege, jen... jen ĉi tie estas koverto.

VICJO: Trovu ankaŭ ian paperon!

MANJO: Joĉjo, skribu vi kion mi diktos, ĉar vi havas belan skribon. Sed unue skribu la adreson. (Joĉjo skribas kaj laŭte diras). Al la Federacio.

MANJO: Tuj vi vidos... nun mi pensas pri ĝi. Ĉu Vi pretas, Joĉjo?

JOĈJO: Jes.

MANJO: Do skribu, skribu jene:

NIA KARA SEKRETARIO!

TROA SCIVOLEMO ESTAS HONTINDAĴO

KAJ ĈE JUNAJ HOMOJ KAJ EN MALJUNAĜO  
Vin salutas LA GAJA TRIO.

VICJO: Ha, ha, ha, perfekte!

JOĈJO: Eĉ pli ol perfekte! (Ĉiuj ridas).

MANJO: Nur rapidu fermi la leteron, ĉar li eble revenos. (Frapado sur la pordo. Granda konfuzo). Eble estas li. Lasu la leteron sur la tablo! (Denove oni frapas).

JOĈJO: Antaŭen.

#### IV. sceno

S-INO NATALIO: Bonan tagon, gesamideanoj!

JOĈJO kaj VICJO: Uh!

MANJO: Ha, sinjorino Natalio, bonan tagon!

JOĈJO: Kio nova?

S-INO NATALIO: Mi alportas al vi telegramon.

ĈIUJ: Telegramon?

S-INO NATALIO (transdonas la telegramon al Joĉjo):

Jen ĝi. La poŝtisto estis ĉi tie antaŭ duonhoro, sed li trovis la klubejon fermita kaj transdonis al mi ĉi tiun telegramon.

JOĈJO: Dankon, dankon, sinjorino.

S-INO NATALIO: Ĝis la revido!

ĈIUJ: Ĝis la, sinjorino (S-mo Natalia eliras).

#### V. sceno

VICJO: Ĉu vi aŭdis tion amikoj? Ŝi diris »antaŭ duonhoro«. Ni ja sidas en la klubejo jam du horojn. Ĉu tio ne estas suspektinda?

MANJO: Suspektinda? Kial? Ĉar la poŝtista moŝto ne bonvolis suprengrimpri kaj opiniis pli komforta lasi la telegramon malsupre?

VICJO: Do bone, al kiu ĝi estas adresita?

JOĈJO: Al la Ligo.

VICJO: Hu, diablo, tiam ĝin lasu fermita.

MANJO: Kaj ĉu ni nun fakte ne devas malfermi ĝin?

JOĈJO: Neniuokaze.

VICJO: Sed... oble estas io grava en ĝi.

MANJO: Certe estas grava... se estas telegramo!

JOĈJO: Ni tamen ne malfermu ĝin! Tio estu nia venĝo al Paŭlo. Estu en ĝi kia ajn grava sciigo! Ni montros al tiu harfendulo, ke ni ne puŝas nian nazon en ĉion.

MANJO: Bona ideo!

JOĈJO: Venu Vicjo, prefere ni daŭrigu ŝakludi.

VICJO: Kaj mi ludu nun kun la homo, kiu antaŭ ne longe ĵetis sur min la samajn figurojn? Sed estu! (Ili komencas starigi la figurojn kaj ekludas).

MANJO (rigardas dume la telegramon scivoleme): Kio povas esti en ĝi?

VICJO (rimarkinte, ke Manjo tro longe rigardas la telegramon): Manjo! Mi esperas, ke vi ne malfermos ĝin. Vi ja ne estas scivolema.

MANJO: Kompreneble, ke mi ne estas. Kion Vi opinias pri mi? Mi nur rigardas la daton.

VICJO: Ĉu? (Daŭrigas ŝakludi).

MANJO: Tamen min interesas kion ĝi povus enhavi.

JOĈJO: Manjo!

MANJO: Kio-o-estas? Mi ja nur rigardas la daton.

VICJO (eksaltas de sur la seĝo): Mil diabloj, mi ne kapablas plu elteni, mi ne kapablas koncentriĝi pri

la ŝako. Miaj pensoj konstante vagas al ĉi tiu malbenita telegramo.

JOĈJO: Kio? Viaj pensoj? Rigardu min: Miaj pensoj... nu, mi devas konfesi, miaj pensoj ankaŭ.

VICJO: Ĉar vidu, eble estas en ĝi io neprokrastebla, io kion ni devus tuj ordigi.

JOĈJO: Jes, jes, eble io neprokrastebla.

MANJO: Nu, knaboj, se ni jam ĉiuj estas tiel aĉe sci-volemaj, tiam mi proponas ion. Mi proponas, ke ni malfermu sekrete la telegramon kaj poste ni denove fermu ĝin. Tion ja estas facile efektiviĝi. Kion vi diras pri tio?

JOĈJO: Nu... en ordo.

VICJO: Ni malfermu ĝin (ili malfermas la telegramon).

JOĈJO: Legu vi, Manjo!

MANJO (ekscitiĝe legas): HODIAU VESPERE MI VIZITOS VIAN KLUBON, SPRACHENWURM, WIENO, AUSTRIO.

JOĈJO: Sprachenwurm. La fama esperantisto!

VICJO: Tiu-okaze ni ja devas atendi kaj akcepti lin.

JOĈJO: Kaj en tia malordo.

VICJO: Ĉu mi ne antaŭsentis, ke estas io neprokrastebla? Nu, la purigado de ĉi tiu ĉambro.

MANJO: Sed knaboj, ni komencu tuj. Li ja povas alveni ĉiumomente.

JOĈJO kaj VICJO: Bone. (Ili komencas ordigi la ĉambron. Subite aŭdiĝas pordoŝrupo).

JOĈJO: A-a-antaŭen! (Granda konfuzo. Manjo kaŝas sin malantaŭ la pianon. Malfermiĝas la pordo kaj enpaŝas Paŭlo, vestita kiel Sprachenwurm).

## VI. sceno

PAULO (parolante kun forte sentebla germana prononco): Bonan tagon, samideanoj.

JOĈJO kaj VICJO: Bonan tagon!

JOĈJO: Ĉu... Ĉu mi havas la honoron saluti sinjoron Sprachenwurm el Aŭstrio?

PAULO: Jes, mi estas persone. Ĉu vi jam aŭdis pri mi?

JOĈJO: Ho, multe.

VICJO: Bonvulu sidigi, samideano!

PAULO: Dankon! (Sidigas).

JOĈJO: Pardonu, ĉe ni estas tia malordo! Ĉu Vi scias, hieraŭ okazis ĉe ni elementa kurso kaj veninte antaŭ kelkaj minutoj, ni ne sukcesis ankoraŭ ordigi la klubojn.

PAULO: Hm, hm... mi vidas, ke vi estas diligentaj. Sed, ĉu vi permesas al mi starigi kelkajn demandojn?

VICJO: Bonvolu, bonvolu, ni klopodos vin kontentigi.

PAULO (Montrante al la disĵetitaj ŝakfiguroj): Ĉu oni kutimas ĉe Vi ankaŭ ŝakludi dum la kurso?

JOĈJO: Jes... tio estas, ne... mi fakte ne komprenas, kial estas la ŝakfiguroj ekstere.

VICJO: Ĉu vi scias, eble la kursgvidanto ludis post la kurso kun iu.

PAULO: Aha!... Sed mi vere ne komprenas. Ĉu viaj kursanoj staras dum la kurso?

VICJO: Kia demando, sinjoro! Kial vi kredas tion?

PAULO: Ĉar la seĝoj estas kovritaj de polvo, sur ili ja ne povis sidi kursanoj.

JOĈJO: Nu... eble la kursgvidanto forgesis fermi la fenestrojn post la kurso.

VICJO: Jes, kaj vi ja scias, ke surstrate estas tiom da polvo!

PAULO: Mi komprenas. Kaj ĉu oni tion instruas al la kursanoj? (Montras al la malspurega kaj plendegnita tabulo).

JOĈJO: Tion... tion certe desegnis nia kursgvidanto post la kurso. Li ja estas tiel ŝercema homo!

PAULO: Ŝercema li estas? Interese, kursgvidanto estas ŝakludema, malordema, forgesema, ŝercema ktp., ktp. unuvorte: tre multeflanka. Kaj vi du certe ja estas lia absoluta antipodo: seriozaj, ordemaj ktp.

VICJO: Povus esti.

PAULO: De kie Vi eksciis, ke mi intencas viziti vin ĉi-vespere?



JOĈJO: Nu, samideano Sprachenwurm, vi... vi ja sendis telegramon al ni!

PAULO: Kiuj estas tiuj »ni«?

VICJO: Ni du.

PAULO: Mi sendis la telegramon al la komitato de la Ligo. Ĉu eble vi du konsistigas la komitaton?

JOĈJO: Ne, ni estas deĵorantoj.

PAULO: Ĉu ĉe vi la deĵorantoj kutimas malfermi la poŝtaĵojn de la pli altaj forumoj?

VICJO: Ni kredis... ni kredis, ke la telegramo enhavas ion tre gravan.

PAULO: Ĉu ankaŭ pri la antaŭe malfermitaj leteroj vi tion kredis?

JOĈJO: Sinjoro, pri kiaj leteroj vi parolas?

VICJO: Pardonu, sed tio ja ne koncernas Vin!

PAULO: Ĉu fakte ne? *Demaskigas sin*.

JOĈJO kaj VICJO: Paŭlo!

PAULO: He, he, he. Nun mi kaptis vin, karaj samideanoj! Do vi estas tiuj, kiuj malfermas ĉiujn oficialaĵojn. Ne sufiĉis mia antaŭ nelonga admono, vi denove faris tion. Hontu!

JOĈJO: Sed Paŭlo!

PAULO: Sed finiĝis la nelinigita regado de via scivolemo. Mi akuzos vin ambaŭ ĉe la komitata kunsido.

JOĈJO: Bone, ni konfesas, ke ni eraris. Pardonu!

PAULO: Nenia pardonu! Sufiĉas el ĉi tiuj porkaĵoj!

VICJO: Ĉu vi neniam faris ion similan?

PAULO: Nenian. Kiam vi vidis min...

JOĈJO: ...»malfermi la leterojn de alia«. Ni konas tiun ĉi blufon, sufiĉas al ni predikoj. Ni iru Viĉjo! Ni vidos ĉu ni estas vere tiel kulpaj!

VICJO: Ni iru!

JOĈJO (al la publiko): ...nur ne malproksimen: en la apudan ĉambron! *(Ili eliras)*.

#### VII. sceno

PAULO: Hej atendu... ne ofendiĝu tiel rapide! Hej! Ili eĉ ne aŭskultis min ĝis la fino. Sed, ĉu mi ne

pravas? Kiu vidis tian scivolemon? Poŝtaĵojn rajtas malfermi nur la adresito. *(Rimarkas la leteron adresitan al la Federacio)*. Letero? Kiam ĝi alvenis? Al kiu ĝi estas adresita? Al la Federacio? Diablo, kio, povus esti en ĝi? Hem, he... se mi malfermus ĝin! Ne, ne... ĵus mi ja predikis kontraŭ la scivolemo. Tamen... Ĉu mi estas sola ĉi tie? *(Trarigardas la ĉambron sed ne rimarkas la kaŝitan Manjon)*. Jes! Mi malfermos la leteron, kiu povus min kontroli? *(Guste kiam li levas la leteron por ĝin malfermi, aŭdiĝas bruo, kaŭzita de Manjo. Paŭlo en sia terurigo lasas fali la leteron)*. Kio estas tio? Ĉu estas iu ĉi tie? Halo? Neniu. Ni malfermu la leteron? *(Mallaŭte eniras Joĉjo kaj Viĉjo, Manjo venas el sia kaŝejo kaj ĉiuj tri ŝteliĝas post la dorson de Paŭlo)*.

#### VIII. sceno

PAULO: Kio estas ene? *(Komencas legi)*.

KARA SEKRETARIO. TROA SCIVOLEMO

ESTAS HONTINDAĴO

KAJ ĈE JUNAJ HOMOJ KAJ EN MALJUNAĜO

Vin salutas LA GAJA TRIO

Diablo, mi estas trompita!

ĈIUJ: Ha, ha, ha, Sinjoro sekretario, seivolemo estas tre malbela. Kia honto! Kiel diras la proverbo?

Kiu fosas sub la alia...

PAULO: ...falas mem en la foson. En belan foson mi falis!

La ceteraj: Ha, ha, ha *(forkuras, Paŭlo skuas la kapon)*.

#### Fino

*Prezentita dum la »Zamenhofa vespero«  
en decembro 1951.*

Sherte Mulo:

## SINJORO PROFITES

Personoj:

Alberto Profites, profiteza esperantisto  
Paŭlo, sekretario de la esperantista societo  
Marteno, komitatano de la esperantista societo  
En la klubejo, Paŭlo malpacience promenas.

MARTENO (*Enirante*): Saluton, Paŭlo, ĉu sola?

PAULO: Jes, mi atendas iun.

MARTENO: Ĉu rendezvuo? Ĉar mi ne ĝenus...

PAULO: Ne, ne! Iu ŝajne tre bona esperantisto interesiĝas pri la okazonta UEA kongreso. Nun mi atendas lin por doni kelkajn informojn. Dum nia lasta renkontiĝo mi ne sciis ankoraŭ ĉu ni ricevos devizaĵojn.

MARTENO: Kaj la rezulto?

PAULO: Ni ricevos!

MARTENO: Nu, ĝojos via nova konatulo. Kaj vi asertas, ke li estas bona esperantisto.

PAULO: Jes, perfekte li regas la lingvon kaj multe scias pri la Movado. Mi konatiĝis kun li apenaŭ antaŭ kelkaj tagoj!

MARTENO: Kiamaniere? Ĉu li venis el alia urbo?

PAULO: Ne, li estas de ĉi tie. Li ne havis ĝis nun tempon okupi sin pli intense pri Esperanto... Sed li ŝajne ekagos.

MARTENO: Jes, ĝuste antaŭ la kongreso. Mi ne fidus je li!

PAULO: Vi estas tro suspektema, kara Marteno!

MARTENO: Suspektema? Ne! Mi nur konas la homojn!

PAULO: Tamen, mi kredas ke vi eraris ĉi foje.

MARTENO: Eble!

PAULO: Li ja promesis aranĝi eĉ ekspozicion antaŭ la kongreso.

MARTENO: Ĉu mi ne konas ĉi tiun homon? Kiel li nomiĝas?

PAULO: Atendu, atendu... li diris sian nomon. Alberto... Alberto Pro...

MARTENO: Alberto Profites! Li?

PAULO: Jes!

MARTENO: Ha, bone mi suspektis! Tiu ĉi homo estas unu el la plej ruzaj estaĵoj sur nia tergloblo. Li tute certe reaktiviĝis nur pro la kongreso. Reaktiviĝo — Ba! nekonvena vorto! Nur atendu kion li laboros! Li trompos vin ĉiupaŝe.

PAULO: De kie vi konas lin?

MARTENO: El la mezlernejo. Ni estis kamaradoj dum pluraj jaroj.

PAULO: Do tiel.

MARTENO: Jes kaj mi avertas vin-gardu vin kontraŭ li!

PAULO: Eble li deziras nun tamen sincere kunlabori.

MARTENO: Certigu pri tio.

PAULO: Kiamaniere?

MARTENO: Hm, hm, atendu...

PAULO: Ĉar oni devas pruvi kion vi diris.

MARTENO: Kompreneble. Jen, mi havas bonegan ideon. Aŭskultu: foriru nun tuj, sed ne malproksimen kaj mi atendos Alberton. Mi sciigos lin pri tio, ke ni ne ricevis devizaĵojn, ke mi scias tiun ĉi novaĵon el certa fonto. Tiam li montros sian veran vizaĝon, li senmaskiĝos. Vi revenos post kelkaj minutoj — tute subite — kaj diros, ke vi ĵus eksciis, ke ni tamen povos vojaĝi al la kongreso. Li certe intencos fulmerapide ŝanĝi taktikon, montri alian vizaĝon ĉar li estas la duvizaĝa Januso mem-nur tiam... Tiam mi hontigos lin. Li devas perdi ĉi tiun batalon!

PAULO: Kaj se vi eraras?

MARTENO: Nu, mi gratulas al vi elkore, ke vi sukcesis reaktivigi tiel »bonan kaj honestan« esperantiston.

PAULO: Bone, mi konsentas!

MARTENO: Do, iru kaj priatentu de ie kiam venos mia paciento.

PAULO: Mi klopodos. (*Eliras.*)

MARTENO: Ha, Profites — la enkorpiĝinta profiteмо! Kiel naiva estas nia sekretario. Kiel li povas supozi tiel rapidan kaj sinceran reaktivigon? Li forgesas, ke ĉio havas sian kaŭzon kaj ĉio sian motivon. Nu, cetere ni vidos. Jen venas iu!

ALBERTO PROFITES (*Enirinte*): Bonan vesperon! Ha, kiu mi vidas! Ĉu estas vi, kara Marteno?

MARTENO: Kia surprizo, Alberto! Kia vento vin blovis ĉi tien?

ALBERTO PROFITES: Kia vento? La vento de la entuziasmo.

MARTENO: Mi gratulas!

ALBERTO PROFITES: Vi ja scias, ke mi estas esperantisto jam delonge kaj unu el la plej fervoraj.

MARTENO: Nenia dubo pri tio!

ALBERTO PROFITES: Mia karulo, mi reaktiviĝis. Mi aranĝos belegan ekspozicion.

MARTENO: Tre laŭdinde!

ALBERTO PROFITES: Mi havigos materialon el ĉiuj urboj de nia lando.

MARTENO: Kia oferemo!

ALBERTO PROFITES: Mi altiros milojn da homoj en niajn ejojn. Estos grandioza tiu ekspozicio, mi garantias al vi.

MARTENO: Kaj ĉion vi faros sindoneme, sen ia ajn profito?

ALBERTO PROFITES: Kompreneble! Mi...

MARTENO: ... ege deziras vojaĝi al la kongreso de UEA!

ALBERTO PROFITES: Sed Marteno, mi...

MARTENO: ... ĉion faros por atingi la celon. Mi malskiĝos, aktoros, hipokritos...

ALBERTO PROFITES: Marteno!

MARTENO: Mi petas?

ALBERTO PROFITES: Marteno, vi estas kelkfoje tro

pikema, eĉ impertinenta. Viaj aludoj...

MARTENO: Miaj aludoj trafis la celon! Kara Alberto, ni konas unu la alian ankoraŭ el la lernejo, ni estu sinceraj! Ni ludu per malkaŝitaj kartoj! Vi ja ne povas trompi min.

ALBERTO PROFITES: Do, bone. Se vi deziras-estu! Nur atentu por ke ne doloru al vi la nuda vero! Eksciu, do... mi reaktiviĝis nur pro la kongreso!

MARTENO: Tion mi supozis.

ALBERTO PROFITES: Kaj por ion profiti oni ja devas ankaŭ ion oferedoni.

MARTENO: Certe!

ALBERTO PROFITES: Tial mi aranĝos la ekspozicion. Por mi Esperanto estas nur rimedo.

MARTENO: Tion mi kredas.

ALBERTO PROFITES: Same kiel por multaj, multaj aliaj esperantistoj. Sed tion vi ne povas kompreni! Vi kredas, ke ĉiuj kiuj laboras ĉirkaŭ vi estas samaj entuziasmuloj, samaj neprofitemuloj, unuvorte: samaj virteĝuloj kiel vi. Vi trompiĝas amare, mia kara! Blinda vi estas kaj malruza kvazaŭ ŝafido. Oni devas el ĉio elsuĉi tion, kio utilas kaj tiom, kiom utilas. Vi ja scias, ke la fortaj venkas la malfortajn kaj la ruzaj la fortajn kaj tamen: Vi intencas ion atingi pere de honestaj rimedoj, laborante, ŝvitante kvazaŭ ĉevalo kaj gajnante eĉ ne unu moneron. Naivulo!

MARTENO: Vi ŝajnas esti tro certa en via vivfilozofio.

ALBERTO PROFITES: Certega! Rigardu nur ĉirkaŭ vin: kiu ne estas profiteмо? Kial venadas la homoj en la societejon? Pro la radio, pro la piano, pro danco kaj amuziĝo, pro la societo! Ĉie nur propraj, privataj celoj. Kial estas gvidataj kursoj? Kial...

MARTENO: Sufiĉas Alberto! Mi ne permesas, ke vi prioktu la honoron de miaj amikoj, ke vi eĉ su-

spektu ion nedecan pri miaj esperantistaj kolegoj, kiuj sindoneme oferas tempon kaj energion por la komunaj celoj.

ALBERTO PROFITES: Naivulo!

MARTENO: Eble... sed mi ne deziras esti eĉ dekone tia kia estas vi.

ALBERTO PROFITES: Ha, ha... Rigardu min, mi nenion faras vane. Mi elflaras ĉiun eblecon, mi profitas el ĉio iom. Ekzemple, nun mi deziras vojaĝi eksterlanden. kaj ĉar neniam alia ebleco ekzistas, mi venis al la esperantistoj. Mi surŝmiros iliajn okulojn per la balzamo de hipokriteco kaj... la pomo falos en mian sinon.

MARTENO: Abomeninde, naŭze!

ALBERTO PROFITES: Ha, ha, tro sentema vi estas! Vi ŝvebas en la aero. Rigardu min: mi ne ŝvebas, sed mi naĝas en la marĉo de la malbela, reala vivo.

MARTENO: Do eble eĉ la kongreso estas nur preteksto por vi?

ALBERTO PROFITES: Nu, mi ĝojas, ke vi finfine komprenis. Mia celo estas: resti eksterlande. Esperantista kongreso? Ba, naivaĵo! Eĉ ne unu tagon mi vizitos ĝin. Iun belan tagon vi ricevos de mi poŝtkarton el Australio aŭ el Ameriko.

MARTENO: Kaj la ekspozicio? Ĝi estas granda laboro, ĉu indas ĝin aranĝi »Sinjoro Profites«?

ALBERTO PROFITES: Kiu diras, ke mi aranĝos ĝin? Mi nur promesis...

MARTENO: Do, tiel? Por tia fiaĵo vi volas eluzi nian Movadon. Ĉu vi ne timas min? Mi ĉion malkaŝos al la komitato!

ALBERTO PROFITES: Vi nenion malkaŝos, ekskolego karega! Mi ja konas vin, vi ne estas Judaso. Vi ne kapablas perfidi malnovan konatulon, amikon.

MARTENO: Vulpo ruzega!

ALBERTO PROFITES: Ha, ha, ha. Vidu, tia estas la vivo. Mi diras, ke vi seniluziiĝos, se ni komencos paroli sincere. Ĉu vi bezonis tion?

MARTENO: Jes, mi bezonis. Mi ĝojas, ke mi ekkonis vin ĝisfunde.

ALBERTO PROFITES: Ne min, sed la homojn!

MARTENO: Vin, ĝuste vin! Nur ĉi foje vi eraris.

ALBERTO PROFITES: Mi? Kial?

MARTENO: Nun estas mi, kiu seniluziiĝos vin.

ALBERTO PROFITES: Bonvulu!

MARTENO: Vi devos serĉi alian rimedon por atingi eksterlandon.

ALBERTO PROFITES: Kial? Ĉu Vi eble volas malhelpi min? Gardu vin, mi ne toleros, ke vi enmiksiĝu en miajn aferojn. Se vi ion diros...

MARTENO: Nenion mi diros, mi ne bezonas diri, kara malnova konatulo, lernejkolego. Ne mi malhelpos vin, sed la cirkonstancoj. Ni ne ricevis devizojn...

ALBERTO PROFITES: Kion?

MARTENO: Vi aŭdis: ni ne ricevis devizojn por veturi eksterlanden.

ALBERTO PROFITES: Vi mensogas!

MARTENO: Mi aŭdis de fidindaj homoj.

ALBERTO PROFITES: De komitatanoj?

MARTENO: Ankaŭ mi ja estas finfine komitatano.

ALBERTO PROFITES: Kiam vi aŭdis tion?

MARTENO: Ĉi matene!

ALBERTO PROFITES: Mil diabloj! Kia malagrablaĵo! (*Eniras Paŭlo. Alberto ne rimarkas lin.*) Kiu povis supozi tion? (*Koleriĝas*) Trompo, aĉa trompo. Malbenita movado, malbenitaj esperantistoj! Pupoj, marionetoj, leporoj malkuraĝaj, stultuloj, naivuloj! Ili malbonigis ĉion pere de siaj idealismaj, aerŝvebaj manieroj. Bando!

MARTENO: Nur furiozu, vi laciĝos kaj dormos pli bone!

ALBERTO PROFITES: Sed mi tuj konjektis tion. Ili havas nenian sperton kiel konduti al la registaro. Ili ne scias paroli, konvinki...

MARTENO: ... aĉe, senhonte aktori!

ALBERTO PROFITES: Adiaŭ Aŭstralio! Nu, sed ne estas ĉio perdita, mi ne eluzis ĉiujn miajn kartojn. Mi serĉos alian vojon por eliri el la lando!

MARTENO: Kaj via reaktivigo?

ALBERTO PROFITES: Mi priŝajnas ĝin. Vi nur krajonu ankaŭ plue, senprofite en ĉi ejaĉo, nur komitatanu, mi-post kelkaj monatoj promenos en eksteralando en belega aŭtomobilo. Nun mi foriras. Diru al tiu ankoraŭ pli granda naŭvulo ol vi, ke mi ne ŝatas aeron de via ŝima muzeo, kie troviĝas nuraj ... nuraj ŝrumpaj mumioj. Diru al li, ke mi ne veturos al la kongreso. Adiaŭ! (*Turnas sin kaj ekvidas Paŭlon*) Vi ... vi estas ĉi tie? Kiam vi venis?

PAULO: Ĝuste en ĉi tiu momento.

ALBERTO PROFITES: Kaj ĉu vi ion aŭdis.

PAULO: Kion?

ALBERTO PROFITES: Kion ni du interparolis. Marteno kaj mi.

PAULO: Nur la lastajn vortojn. Ke vi ne deziras vojaĝi al nia kongreso. Mi treege bedaŭras. Guste nun mi eksciis, ke ni ricevos devizojn.

ALBERTO PROFITES: Ni ricevos devizojn?

PAULO: Jes. Mi rapidis ĉi tien, mi kredis, ke vi ĝojos, kaj nun mi aŭdas pri via subita nekomprenebla decido.

ALBERTO PROFITES: Mi ja ne diris ....

PAULO: Jes, jes, vi ne diris la kaŭzojn ankoraŭ al mi, sed mi supozas ke ili estas gravaj. Certe io okazis en la familio.

ALBERTO PROFITES: Sed samideano ...

PAULO: Nu, kion fari? Sed la situacio ne estas tiel tragika. Anstataŭ vi vojaĝos nia meritplena samideanino Modestes. Ŝi tiom multe revis pri la kongreso.

ALBERTO PROFITES: Sed ... vi permesos al mi aranĝi la ekspozicion, ĉu ne?

PAULO: Dankon, mi tre estimas vian neprofiteman sinoferon, sed la ekspozicion aranĝos samideano Oferes. Ĝoju do, liberiĝis de sufiĉe malfacila kaj teda laboro.

ALBERTO PROFITES: Sed vi certe trovos ian alian laboron por mi.

PAULO: Ĉi momente ne!

ALBERTO PROFITES: Eble post kelkaj samajnoj.

PAULO: Eĉ tiam ne!

ALBERTO PROFITES: Antaŭ la kongreso. Tiam estos multe da laboro.

PAULO: Ne, neniam!

ALBERTO PROFITES: Kiel?

PAULO: Ankoraŭ foje dankon pro via elkora sincera ofereco, sed ni havas sufiĉe da ŝrumpaj mumioj, kiujn ne naŭzos la aero de ĉi tiu ŝima muzeo, ili finpretigos ĉiun laboron.

ALBERTO PROFITES: Ha, do vi subaŭskultis?! Vi du konspiris kontraŭ mi! Friponaj trompuloj, Bando ... bando de mumioj! (*Elkuras fermante bruege la pordon.*)

MARTENO: Ha, ha, sinjoro Profites ...

PAULO: ... ĉi foje nenion profitis. Tiun ĉi ni elsarkis el nia movado!

MARTENO: Kaj por ĉiam!

FINO

*Prezentita dum la »Moja aranĝo« en majo 1951.*

Shertse Mulo:

## GRANDA KVARELO PRO BAGATELO

Personoj:

Petro, juna esperantisto

Mario, juna esperantistino, lia amikino

Joĉjo, juna esperantisto, amiko de ambaŭ

En la klubejo.

PETRO (*sola sidas ĉe la tablo kaj foliumas gazetojn*)

MARIO (*eniras*): Saluton!

PETRO: Salutegon mia kara!

MARIO: Kion vi faras ĉi tie?

PETRO: Mi trarigardas la gazetojn por trovi bonan adreson.

MARIO: Por korespondado? Ankaŭ mi bezonas adresojn. Ĉu vi jam trovis ion?

PETRO: Ĝis nun ne, mi ja komencis serĉi antaŭ kelkaj minutoj. Sed venu ĉi tien, sidigu kaj ni serĉos kune... Atendu, kion ni faros ĉi vespere?

MARIO (*sidigas*): Mi havas nenian apartan programon. Ĉu ni promenu en la parko?

PETRO: Brile! Ho, kia bona sento estas teni viajn etajn manojn (*prenas ŝiajn manojn*) kaj...

MARIO: Min kisi!

PETRO: Vi divenis. Sed nun ni rigardu la gazetojn (*Komencas legi*) Juna anglino deziras ah, tiun mi ne bezonas. 32-jara komercisto el Antwerpen... al diablo! Grupo de junaj Esperantistoj... de kie, de kie...? Germanoj! Tio ne estas por mi. Mi deziras iun el la nordaj landoj.

MARIO: Jes tio estas ankaŭ mia sonĝo.

PETRO (*Daŭrigas legadon*): Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn... terure kiel tediaj homoj ekzistas; ili kolektas poŝtmarkojn... paperpecojn... salivon.

MARIO: Nu trovu ion mia kara.

PETRO: Sed antaŭ ĉio permesu ŝmacegon (*Ŝmaco*). Do, plifortigitaj per tiu kiseto, ni daŭrigu la serĉadon. Juna svedino el Uspala... ho, juna svedino, dank al dio! Finfine mian serĉadon kronis sukceso. Kia ĝojo, tra, la, la...

MARIO: Aŭskultu!

PETRO: Tra, la, la... (*Prenas la gazetojn kaj dancas ĝojplene*)... la, la.

MARIO: Aŭskultu (*Levas sin kaj iras al Petro*) Mi tiom deziras korespondi kun svedino, lasu al mi ĉi tiun edreson.

PETRO (*Ne aŭdas ŝin*): Tra, la, la... (*Ekkomprenas kion ŝi diris*) Mi petas?

MARIO: Donu al mi ĉi adreson.

PETRO (*Serioziĝas*): Kion vi diras? Ke mi donu ĝin? Sed penpene mi ĝin trovis. Serĉu alian!

MARIO: Ho Peĉjo, ĉu vi amas min?

PETRO: Kompreneble.

MARIO: Tiam faru al mi ĉi tiun etan komplezon.

PETRO: Ankaŭ vi povas serĉi.

MARIO: Petro!

PETRO: Tute vane!

MARIO: Kio okazis pri vi? Ĉu vi ne emas fari al mi ĉi tiun malgrandan komplezon?

PETRO: Mi kapablu, sed mi ne volas, ke vi misuzu mian bonecon.

MARIO: Ne koleru kara, ni ambaŭ skribos al ĉi tiu svedino.

PETRO: Ne estas eble. Pri kio vi volus ke du homoj skribu el la sama urbo? Kiaj estos iliaj temoj? Estas tro du korespondantoj eĉ el la sama lando.

MARIO: Cedu al mi la adreson.

PETRO: Neniam. Vi estas tro postulema.

MARIO: Kaj vi tro ekscitita hodiaŭ.

PETRO: Kaj vi, kaj vi... malhontema kvazaŭ muŝo.

MARIO: Ĉu vi eble intencas ofendi min?

PETRO: Mi intencas nenion. Mia sola deziro estas ke vi ne ĉagrenu min.

MARIO: Korelemulo! Diru ke vi estas malbonhumora hodiaŭ, ke vi volas kvereli kaj mi tuj foriros.

PETRO: Vi povas foriri ankaŭ sen tio.

MARIO: Ha, tiel? Do tiel vi amas min.

PETRO: Ne inde vin ami!

MARIO: Sed min kisi en la parko, ĉu inde?

PETRO (Ekkoleras): Se vi ekscitos min, mi ne iros promeni hodiaŭ.

MARIO: Ni ne bezonas, mi trovos alian amuzon.

PETRO (Moke): Kaj eble alian amikon...

MARIO (Kolere): Jes, eble ankaŭ tion.

PETRO: Trovu, trovu! Iru al diablo!

MARIO: Poste vi pripentos ĉi konduton.

PETRO: Silentu inaĉo serpentlanga.

MARIO: Kion vi diris? (Komencas plori.)

PETRO: Mi vin ne plu bezanas, nebla estaĵo. Mi bedaŭras ĉiun momenton, kiun mi perdis ĝis nun pro vi.

MARIO (Ploras. Aŭdinte la lastajn vortojn eksaltas kaj donas vangofrapon al Petro): Mi montros al vi senhontulo, trompulo...

PETRO: Sufiĉas!

MARIO: Sentaŭgulo, tempŝtelisto...

PETRO: Mi ŝtopos vian buŝon.

MARIO (Plore kaj kolere): Fripono senkora, sovaĝbesto...

PETRO: Sed sufiĉas! (Iras kontraŭ ŝin)

MARIO: Sangsuĉa ti... (je la komenco de la vorto »tigro« Petro sukcesas meti la manon sur ŝian buŝon)

JOĈJO (Enpaŝinte): Sankta dio! Kio okazas ĉi tie? Haltu, haltu! (Kuras al li kaj distigas ilin) Fulmotondro! Kial vi disputas?

PETRO: Ĉi tiu kokino volis forrabi mian pen-trovitan adreson de svedino.

MARIO: Besto kruela!

JOĈJO: De kiu svedino?

PETRO: De iu juna el Upsala.

JOĈJO: Ĉu dudekjara? Studentino de medicino?

PETRO: Jes.

MARIO: Fripono malbenita! Adiaŭ por ĉiam. (Foriras brue fermante la pordon.)

JOĈJO: Ho, vi stultaj! Ha, ha, ha, vi kverelis tute vane. Kaj nun ŝi ofendigis kaj forlasis vin furioze... kaj preskaŭ vi mortigis... unu la alian... ha, ha, ha, Kara mia, al ĉi tiu svedino el Upsala mi skribis antaŭ unu monato kaj jam ricevis respondon.

PETRO: Vi? (Konsterniĝas. Frapas sian frunton kaj lasas sin fali sur la seĝon. Muta sceno)

FINO

Prezentita post la societa ĉefkunveno en februaro 1950.

AMERIKA GEEDZIĜO

Dramigita laŭ la novelo de nekonata aŭtoro.

Personoj:

Mr. Croft, proprajulo de la firmo »Malamiko al razilo«.  
Bob, lia filo  
Miss Percy  
Sekretario de Mr. Croft.

Scenejarango:

Unu skribtalbo, unu apogseĝo, du pordoj.

PERCY: Aŭskultu Bob, mi scias, ke via patro estas proprajulo de la firmo »Malamiko al razilo«. Mi scias, ke li-maljuno vulpo-bonege konas la leĝojn de reklamo kaj ke li afiŝigis tra la tuta Ameriko reklamafiŝojn pri sia patentita razokremo »Malamiko al tranĉilo«. Sed mi ankaŭ scias, ke la uzantoj de tiu kremo, kiu forprenas harojn de la barbo sen razilo, ofte restis ankaŭ sen haŭto, pro la troa efiko de la mirakla kremo. Sed tamen, aŭskultu Bob, kiel estus se mi edzigus vin al mi?

BOB (*ruĝiĝas, konfuze rigardas siajn lakitajn ungojn kaj flustras*): Parolu kun la patro.

PERCY: Ĉu Vi ne havas propran volon?

BOB (*eĉ pli konfuzite*): Parolu kun la patro.

PERCY: Bone, kiel mi venos al li?

BOB (*Tute konfuzita levas la ŝultrojn, stulte rigardante ŝin*):

PERCY: Eh! (*rapide kaj energie foriras, bruferminte la pordon post si*). Eniras.

CROFT: Do, kial vi staras ĉi tie kvazaŭ malsekaokino?

BOB: Paĉjo, ŝi....

CROFT: Kiu ŝi?

BOB: Si-i-i (*preskaŭ plorante*).

En tiu momento ĉe la pordo oni aŭdas disputon, la sekretario malhelpas Percy eniri, sed ŝi energie puŝas lin flanken kaj eniras. Dum la luktado ŝi parolas: Se mi volas eniri, mi eniros.

PERCY: Mi estas Miss Percy. Ĉu vi estas Mr. Croft? Sekretario faras malesperajn gestojn kaj rapide foriras. Bob vidinte ŝin forkuras tra la alia pordo.

CROFT: Jes.

PERCY: Mi petas la manon de via filo. Mi opinias, ke li estos tre feliĉa apud mi.

CROFT: Hm, kaj ĉu vi povos mone subteni junulon kiel Bob, konforme al lia rango? Mia knabo estas tre eldortita. Kioma estas via havaĵo?

PERCY: Mia havaĵo ne estas konsiderinda, ĝi konsistas el ŝparumo, kiun mi akiris pere de persona laboro. 1.200 Dolaroj.

CROFT: Hm, hm.

PERCY: Sed krom tio mi estas kapabla, riĉa je ideoj kaj tre virta.

CROFT: Kara mia, mi konas nur tri virtojn kaj ili estas: mono, mono kaj denove mono. Mia filo povas edziĝi nur al milionullino.

PERCY: Domaĝe. Mi volonte enirus vian firmon kaj vi restus mirigita kiel la negoco bone prosperus. Vi jam iom suferas de sklerozo, dume Bob estas nesufiĉe inteligenta por la laboro. Sed eble vi baldaŭ ŝanĝos opinion. Mi memstariĝos kaj konkurencos al vi.

CROFT: Ho-ho-ho-hi-hi! (*kaj persone malfermas la pordon montrinte al Percy eliron*).

PERCY (*ruze-mokeme rigardas lin, per fieraj paŝoj eliras dirante*): Ni vidos unu la alian refoje.

CROFT malbonhumore iras al la skribotablo, tie staras unu momenton kaj batas per pugno la tablon.

SEKRETARIO: Sinjoro ĉefo, sinjoro ĉefo!

CROFT: Bone, bone, ĉu io brulas?



SEKRETARIO: Bonvolu rigardi kion mi trovis inter la poŝtaĵoj. Jen (*legas*)

VERO EN REKLAMO LA SOLE EFIKA NE-DANGERA RIMEDO PER KIU VI POR ĈIAM SPAROS AL VI RAZADON...

CROFT: Donu al mi (*legas plue*) MALKOVROS ĜIN AL VI MISS PERCY, SE VI SENDOS AL ŜI SUMON DE UNU DOLARO AL POŝTFAKO II-189. EN OKAZO DE MALSUKCESO, MI REDONOS LA MONON«.

SEKRETARIO: Jen, ankaŭ en gazetoj estas tiu anonco. Ĉie, ĉie.

CROFT (*ekscitite*): Tio estas skandalo. Tiu bestulino fakte konkurencas al ni. Kion fari?

SEKRETARIO: Oni devas subaĉeti ŝin.

CROFT: Ĝi kostus troe. Unue ni devas vidi ŝian rimedon, donante ĝin al mia kemiisto por analizo.

Sendu al ŝi tuj unu dolaron kaj laŭ ebleco trovu ankaŭ ŝin. (*Falas en seĝon*).

SEKRETARIO *foriras*.

BOB *eniras timeme*.

CROFT: Nu, belan edzinon vi trovis, ŝi konkurencas al ni.

BOB: Ŝi trovis min, ne mi ŝin.

CROFT: Stultulo, nenion vi kapablas memstare fari.

SEKRETARIO (*eniras*): Jen, la respondo estas ĉi tie.

CROFT: Donu (*sekretario eliras*).

CROFT (*legas*): KUN DANKEMO MI KONFIRMAS RICEVON DE UNU DOLARO KAJ KONTRAUSERVE MI MALKOVROS AL VI RIMEDON, PER KIES UZADO VI GARANTIITE NENIAM BEZONOS RAZILON KAJ KROM TIO VI GARDOS LA HAUTON:

LASU LA BARBON KRESKI.

Porkino (*Furioze rigardas filon kaj la filo lin*).

SEKRETARIO *anoncas Miss Percy*.

CROFT: Ŝi bonvolu eniri.

PERCY *eniras kvazaŭ venkantino*.

CROFT: Pro nomo de dio eniru mian firmon kaj fariĝu utila membro de homsocio. Vi havas talenton. Sed mian filon vi devas elpuŝi el la kapo, ĉar mi mem edzinigos vin. Mi estas vidvo.

PERCY (*jetas sin en apogseĝon, elprenas cigaredon, kiun Croft rapide bruligas*): All right, tiel ankaŭ mi baldaŭ fariĝos vidvino.

*Prezentita dum la »Drama vespero« en junio 1950.*

Emiliĵa Lapenna:

## GALERIO DE FIECOJ

Rolantoj:

Enkondukanto  
Avareco  
Profitemeco  
Trosinamo  
Jaluzo

ENKONDUKANTO: Jen, hodiaŭ antaŭ vi preterpasos kelkaj fiecoj. Vi demandas kial fiecoj, "kial ne virtoj? Oh, ĉar virtoj estas tiom estimataj, tiom altŝatataj kaj alttaksataj sed enuigaj kaj neinterresaj. De la antikva tempo ĝis hodiaŭ en poemoj, teatraĵoj kaj kantoj estas traktitaj nur fiecoj, ĉar ili estas viglaj, ili priridas, pikas, brulas, ili subfosas sed estas allogaj, kvankam de ĉiuj kondamnitaj kaj kritikataj.

La unua el nia galerio estas unu Li. Oh, vi tuj rekonos lin. Lin eternigis jam la malnovaj grekaj komedioj, li promenas tra verkoj de Shakespeare kaj Molière. Jen li venas. Poste vi diros al mi, ĉu vi rekonis lin. (Foriras).

AVARECO (*nejuna viro, magra, acidvizaĝa, palpas monujon*): Ah, jen, ili estas ĉi tie. O dio, ĉu ili fakte estas ĉi tie? A-a-a. Karaj miaj, ĉu vi bone fartas en via dometo, mia monujo? Plaĉaj miaj ĉarmuletoj- Kiel belege vi aspektas, kian diebelan koloron vi havas. Vi estas la plej belaj bildoj, kiujn mi konas, ĉiuj aliaj kompare kun vi estas neniaĵo, malvalora bagatelaĵo. Finfine, ĉu povus ekzisti iu ajn bildo en la mondo sen via protekto? (*La tutan tempon li tenas en la mano bankbiletojn, karesas ilin, enamiginte rigardas ilin*). Ne, ne, karuloj miaj. De peniko, koloroj, tolaĵo, ĝis la pentristo mem, jes, ĉion oni akiras nur pere de vi, neanstataŭeblaj miaj amikoj! Oh, kiel konservi vin, ke vi restu ĉe

mi, kiom eble plej longe, por ĉiam, por ĉiam ke mi havu vin sur mia koro? Diable, se oni ne devus manĝi. Teruraĵo, doni vin por tiuj aĉaj aĵoj kiel terpomoj, kukumoj, brasiko, salado. Ĉion ĉi oni formangas dum unu tagmango, poste... restas nenio, kaj vi lasis min por ĉiam, ĉiam. Stulta homaro ĝi okupiĝas per diversaj sensecaj eltrovaĵoj kaj neniu ankoraŭ elpensis kiel oni povus vivi sen elspezoj por vivbezonaĵoj. Ankaŭ por loĝejo, vestaĵoj, ŝuoj, uh! terure, por kiom da abomenaj aferoj oni devas elspezi monon, monon la plej valoran aĵon en la mondo. Mono, estante malviva, aĉetas ĉion vivantan, estante malgranda papereto altiras al si pli da homaj sopiroj ol iu ajn alia aĵo kaj aĵego, mono, mirakla ilo, kiu en homaj okuloj al la malfortulo donas forton al la stultulo saĝecon al la aĉulo virton al la sentaŭgulo estimon.

Ĉu mi ne pravas adori tiel potencaĵon idolon?

Sed kielmaniere reteni vin ĉe mi, ne elspezi vin, miaj kolombetoj? Mangaĵon mi devas aĉeti ĉi tiu, kion fari, mi devas. Loĝejon mi ankaŭ devas pagi. Ĝi fakte estas krimo, ke la homo devas pagi por tio, ĉar li estas kaj dormas en unu ĉambro. Oni vidas, kiel stultan ordon la homaro ankoraŭ devas toleri. Vestaĵon? Ne, vestaĵon mi ne aĉetos. Tiu ĉi estas ankoraŭ tre, tre bona. (Lin vestas tute, tute eluzita kostumo). Kaj mia edzineto? Nu, ŝi ne bezonas monon, ŝi estas idealistino, ŝi posedas mian amon kaj tio tute, tute sufiĉas, oh ŝi ofendiĝus, se mi volus ion elspezi por ŝi.

Tiel miaj karaj, vi restu ĉe mi longe, sed neniu tion devas scii, ĉar homoj estas ŝtelemaj, pro tio mi fortentas min malproksime de ili, nenium mi volas koni kaj neniu konu min, ĉu ne, vi ne konas min? (*Direktas sian demandon al la rigardantoj kaj foriras*).

ENKONDUKANTO (*eniras*): Kompreneble, ke vi konas lin. Nu, kiu li estas? Nu, lia nomo estas? Ava-

reco, avareco abomena. Certe, ke vi jam devis renkonti lin, ĉu?

Sed nun venos iu alia. Ankaŭ Li. O, lin bone konas ĉiuj socitavoloj de la antikva tempo ĝis hodiaŭ. Sed rekoni lin ne estas tiel facile, kiel la acidan Avarecon. Tiu venonta Li estas ĉarma, dolĉa, ridanta, plena de flataj vortoj, komplimentoj. Pro tio multaj naivuloj tre, tre ŝatas lin. Atentu, atentu bone, ke ankaŭ vi ne falu en ĉan oran, venenan reton. (*Foriras*).

**PROFITEMECO**, *juna plaĉa dando eniras*: Ĉu vi scias, kiel oni povas per malmulte da mono multon havi? Jen, estu kiel mi. Mi fumis, mi ŝatas multe fumi, sed bonajn cigaredojn. Ĉu mi elspezu monon por »Drina«? Ne, por tio estas aliaj. Mi simple ludas rolon de la homo, kiu ĵus nun, nu, jen, antaŭ kelkaj minutoj forfumis la lastan cigaredon kaj hejme havas la tutan skatolon de »Drina«, vidu, kia fiaĵo, kaj ĉe si eĉ ne unu. La viktimon mi ĉiam serĉas inter tiuj, kiuj fumas »Drina«, la »Drava« fumantojn mi lasas en paco. Nu, kaj oni ne povas ne doni al mi cigaredon, kiun mi tuj redonos reveninte hejmen kaj pleniginte mian cigaredujon per nova cigaredprovizo. Sed ili atendu, stultuloj. La longa, griza barbo elkreskos al ili ĝis mi plenigos mian cigaredujon.

Eble vin interesas kiel mi sukcesas ofte bone manĝi? Jen, tie helpas al mi virinoj. Mi amindumas multe, ĉiuflanke, al junaj, aĝaj, belaj, malbelaj, saĝaj, stultaj, malgrandaj, grandaj, nigraj, blondaj, miopaj, lamaj, ĝibulaj, do, unuvorte al ĉiuj. Kial ili ne havu ĝuon kaj al mi tio neniom kostas? Kaj multaj el tiuj feliĉulinoj invitas min okaze de siaj naskiĝtagoj, nomtagoj, geedziĝfestoj kaj mi venas ĉiam kun bukado da floroj, plej malmultekostaj, kiujn mi sukcesas trovi, kaj la unuaj vortoj, kiam mi venas, estas bedaŭro, ke mi nenion pli bonan

povis trovi, sed kompreneble, nun en tiu ĉi urbo, en la hodiaŭaj cirkonstancoj, oni nenion valoran sukcesas trovi, ĥa, tio jam estas konata fakto, ĉu ne? Kaj kompreneble, ŝi tuj komprenas mian bedaŭron kaj kun granda danko akceptas mian mizeran florbukedon, invitante min al la tablo, kie mi per bonaj sandviĉoj, tortoj, kukoj, likvoroj, abunde kompensas la etan elspezon por floroj.

Ekskursi mi ankaŭ ŝatas. Sed neniam sola. Finfine kiu normala homo ekskursas sola? Ankaŭ duope ne. Tio kostas tro. Sed en granda grupo, tio estas plej bela kaj plej malmultekosta. Por pagi vagonaron mi alpruntas monon kaj mi redonos, jes, certe mi redonos, kiam mi denove renkontos mian viktimon, kiun mi intertempe vigle evitas. En vagonaro mi bone amuziĝas mi kantas krias kaj kiam ni atingas ekskurslokon ni elvagoniĝas kaj eniras gastejon. Ekskurso sen gastejo ne estas ekskurso. Mi estas ĉiam plej granda propagandanto de kolektiva gastejvizitado. Ni komune sidas, ni komune manĝas, ni komune trinkas kaj ni komune pagos. Sed mi ne diras kioman parton de la komune elspezo mi pagos. Kiam la kelnero venas, mi grandgeste donas du dinarojn. Ĉu tio ne signifas ankaŭ »partopreni en la komuna pagado«? Finfine, la kalkulo estas tamen ĉiam pagita, ĉar en la granda societo ĉiam troviĝas monhava stultulo, kiu pagas la reston de 300, 400 aŭ 500 dinaroj. Pro tio mi ĉiam ekskursas en granda grupo. Ĉu mi ne pravus? Ĉu vi konas min? (*Foriras*).

**ENKONDUKANTO**: Certe ke vi rekonis lin, ne estas ja eble, ke vi neniam en la vivo renkontis tiel alt — malsimpatin fiecon! Nu, kio estas lia nomo? Nu? Jes, profiteculo, aĉa profiteculo li estas. O, tiu bela floro abunde kreskas tra la tuta mondo, sed feliĉe, nia verda ĝardeno ne estas tro konvena grundo por tiu herbaĉo. Idealismo malodoras al tiu floro.

Kaj nun, nun venos iu Ŝi. Edzinoj, severe observu viajn edzojn por ke ili ne enamiĝu al ŝi, kiu estas la plej bela, la plej inteligenta, la plej saĝa, la plej ĉarma — laŭ ŝia propra opinio! Ni vidos, ĉu vi havos la saman opinion pri tiu »fiecino«. (Foriras.)

TROSINAMO, *juna senguste paradvestita koketulino eniras rigardante sin en la spegulo*: Ne, absolute ne, pli bela buŝo en la mondo ne ekzistas. Ankaŭ la hararo nun fariĝis tiel bela, tiel bela, nekredible. Mi fakte ne scias kion fari, homoj disŝiros min per rigardoj. Ekzemple hodiaŭ en kafejo unu volis tragluti min per okuloj, li certe havis preparitan geedziĝproponon, sed mi tion ne akceptus, komprenoble. Oh, koncerne la geedziĝon, mi entute ne scias kion terura situacio! Mi envias virinojn, kiuj ricevas nur unu geedziĝproponon, tiam estas facile decidi: oni devas akcepti tiun sole havatan eblajon. Sed mi, kiel mi elektu inter ĉiuj, inter tiom multaj? Vere, ili mem komprenas mian malfacilan situacion kaj neniu el ili ĝuste rekte proponas al mi geedziĝon, sed mi legas en iliaj okuloj, en la esprimo de iliaj povraj vizaĝoj, kion ili deziras. Mi tion vidas klare, ĉar mi kapablas klare rigardi, sed aliaj ne. Ekzemple, mia stulta amikino pensas, ke mi restis ĝis nun needziniĝinta ĉar neniu volis min. Idiotino! Ah, alia mia malfeliĉo estas, ke mi ne povas trovi al mi indan societon. Neniu estas tiel saĝa kaj tiel inteligenta kiel mi. Terure, mi tiel ŝatus troviĝi en la societo de pli saĝaj, ke mi ion profitu, sed ve, en kiun ajn societon mi venas, ĉiam mi estas la plej inteligenta. Ofte mi en tia societo devas silenti, ĉar ili klaŝas pri tiel sensecaj aferoj, ke mi eĉ buŝon malfermi ne emas, sed ankaŭ silentante mi superas ilin per mia intelekta forto.

Oh, jam estas la naŭa. Mi rapidas al Esplanade. Hodiaŭ ili tie havos okazon vidi min kaj ĝui rigardante

min. Mi rapidas, mi ne volas ke ili restu longe sen tiu ĝuo, ĉar apud ĉiuj aliaj ecoj, mi estas ankaŭ grandanima kiel ĉiuj elstaraj personoj. Ĝis la revido, mi rapidas! (Foriras)

ENKONDUKANTO: Ĝis neniam-revido, vi, nu, kiu estas ŝi? Nu, kuraĝe, ne timu malĝentilecon. Ŝi ne aŭdos, ŝi estas tro okupata pri sia spegulo. Nu, kiel oni ĉe ni titolas similajn virinojn? Al-sienamiĝinta anserino! Jes, ja, ĉu ĉiuj viroj restis nevunditaj?

Sed nun, gardu vin ĉiuj bone, ĉar nun venos la plej brua, la plej krianta, la plej temperamenta, flamon blovanta, seĝojn rompanta fieca Moŝto. Br-r-r mi devas forkuri ĝustatempe, por ke tiu mortiganta forto ne kaptu min, rapido. (Forkuras, sed apud la elirejo renkontas Jaluzon. Ĉerca sceno, tremantaj genuoj. Elkuras.)

JALUZO (*junulo, frenezspekta, ne mano portas hakilon*): Kie li estas? Mi estas certa, ke ŝia amanto estis ĉi tie. Jam de la ŝuparo mi flaris, ke iu fremda eniris la domon, la strangaodoro eniris mian nazon tuj kiam mi eniris, ha, fremdulo, parfumita, trapasis ĉi tie kaj certe estis ĉe mia edzino. Nur, kie ŝi povis kaŝi lin? Ĉu sub la fortepiano? Diable, ĉi tie estas tiom da loko, ke dekon da ili ŝi povus alpuŝi sub ĝin. Kial oni entute plenigas domojn per tiom stultaj meblopecoj kiel fortepiano? Mi elĵetos ĝin el mia loĝejo, mi forhakos ĝin, ke ŝi ne havu kaŝejon por siaj amantoj. Sed ankaŭ sub la tablo ŝi povis kaŝi lin. Finfine, ĉu tablojn oni fakte bezonas? Manĝi oni povas staranto inter du kunvenoj, skribi oni povas ankaŭ sur genuoj kaj havi tablojn por povi meti sur ilin la vazojn, estas afero arkaika. Kiaj vazoj? Malsana romantiko, nenion komunan havanta kun la hodiaŭa realismo. Do, ankaŭ tablon mi ne bezonas kaj mi forhakos ankaŭ ĝin, por ke ŝi perdu tiun

kaŝejon por siaj amantoj. (Serĉas ĉie en la ĉambro) Nenie li estas, skandalo, kiel ili ambaŭ forkuris antaŭ mi. Kaj kie povus esti ŝi? Reveninte hejmen ŝi certe diros al mi, ke ŝi devis ion atendi en la »vosto«. Scias mi bone, kia »vosto« ĝi estas. Ŝi amindumas kun la vendisto kaj pro tio pasigas horojn por stari antaŭ vendejo kaj rigardi lin ene. Sed mi trovos medikamenton ankaŭ kontraŭ tio. Jes, mi iros al poliestro, petante lin, ke li tuj malpermesu staradon en la »vosto«, ĉar tio alportas malmoraleon, danĝerigas geedziĝojn!

A, eble ŝi estas ĉe la frizisto? Eĉ certe, ŝi estas tie. Ŝi pensas, ke mi ne rimarkis, kiel antaŭhieraŭ, pasinte preter la frizejo, li salutis ŝin per vortoj: »Kiam vi venos?« Ĉu frizisto nur pro honorario tiel afable salutis sinjorinon kaj invitus ŝin al vizito? Tute ne, inter ili enstas amo kaj ŝi nun estas en liaj manoj, li karesas ŝian kapon kaj mi stultulo ĉi tie vane perdas tempon anstataŭ kuri tien kaj forte, fortege vangofrapi ŝin kaj ŝian friziston. Oh, kiel la manoj ege jukas min! (*Elkuras kvazaŭ freneza*)

ENKONDUKANTO: No, tiun stultulon vi certe rekonis. Li vivas en multaj literaturaĵoj. Jaluzo estas lia mono. Sed hodiaŭ ne tiel floras lia laboro kiel iam. La virina progreso malakrigis liajn ungojn kaj estonte reduktos tiun foje grandan potencon al tute, tute eta modesta senteto.

Kaj nun ni ne plu havas aliajn fiecojn. Ĉiuj aliaj forkuris el la kaĝo de nia galerio. Do, certe ili kaŝas sin ie en la salono, eble malantaŭ via seĝo, eble sub ĝi, eble sidas apud vi. Gardu vin bone, ĉar multnombraj estas homaj fiecoj, troveblaj ĉie, bedaŭrinde ankaŭ tie, kie plej malmultaj el ni emas trovi ilin nome en ni mem. Do, se iu fuĝinto el nia

kaĝo trovis kaŝejon en via koro, ne estu malbonhumora, restu gaja, bone amuziĝu, konsciu, ke nenies, nenies, nenies koro estas sen ĝi!

#### FINO

*Prezentita dum la societa kunveno en oktobro 1956.*

AKVARIO

Dramigita laŭ la novelo de nekonata aŭtoro

Personoj:

Miĉjo — edzo

Ponjo — edzino

Unu angulo de la societo estas ordigita kiel simpla ĉambro, en kiu estas unu apogseĝo, malgranda tableto, krom tio iu meblo (fortepiano, malalta ŝranko aŭ io simila) sur kiu staras fiŝujo kun naĝanta ruĝa fiŝeto ene. Fiŝujo estas simpla botelo por kukumoj.

Ambaŭ geedzoj estas en hejmaj vestoj.

PONJO (*rigardante en fiŝujon mokeme klinas la kapon dirante*): Ĝi tute ne grasiĝis.

MICJO: Kiu ne grasiĝis?

PONJO: Via orfiŝeto, Miĉjo?

MICJO (*faldas la gazeton demetante ĝin*): Hja, kial ĝi devus grasiĝi?

PONJO: Rememoru nur kiom da nutraĵo ĝi konsumis, ĝi devus estis dikega.

MICJO: Mia kara orknabineto, se tio estus regulo, vi devus esti ronda kvazaŭ bareleto.

PONJO: Ĉu tio signifas...?

MICJO: Ne, ne, mi ĝuas kiam vi manĝas kun bona apetito. Mi nur opinias, ke ne estas bele ke vi riproĉas al povra fiŝeto tiujn kelkajn formikovojojn. Finfine ĝi nenion havas el la vivo.

PONJO: Kaj kion havas mi?

MICJO (*virmaniere nekompreneble*): Kion?

PONJO: Mi dezirus scii, kion mi havas el la vivo?

MICJO: Pro dio, vi vizitas kinejon...

PONJO: Tion ĝi ĉiuokaze ne povas.

MICJO: Kiu?

PONJO: Orfiŝeto, fiŝoj ne povas viziti kinejon.

MICJO: Kiel al vi entute venis la ideo, ke fiŝoj povus iri kinejon?

PONJO (*mokeme ridetas*): Do, ĉu vi mem ne diris: fiŝeto nenion havas el la vivo kaj mi vizitas kinejon... Vi povas ankaŭ ĝin konduki kinejon, se vi ja tiel kompatas ĝin. Eble ni povus morgaŭ kunpreni ĝin al...

MICJO (*englutas koleron*): Kaj kiu parolas pri tio? Mi nur defendas min kontraŭ viaj riproĉoj, ke vi nenion havas el la vivo, vi vizitas kinejon, aŭskultas radion...

PONJO: Ankaŭ ĝi aŭskultas.

MICJO: Kiu?

PONJO: Orfiŝeto.

MICJO (*ŝajnigas nenion aŭdi*): Vi havas ankaŭ amikino.

PONJO: Mi petas aĉetu amikino ankaŭ al nia orfiŝeto, por ke ĝi kostu eĉ pli. Du fiŝoj formangōs duoble tiom multe, kiom unu sola.

MICJO: Sed Ponjo, orfiŝeto kostas ĝuste neniom.

PONJO: Vi foje devus mem elkalkuli.

MICJO: Mi jam elkalkulis.

PONJO: Do, kaj la rezulto?

MICJO: Ĝis hodiaŭ jen, dum plenaj kvar jaroj, la orfiŝeto kostis kelkajn dinarojn.

PONJO: Ĉu vi la panerojn ankaŭ enkalkulis?

MICJO: Kiujn panerojn? Mi ne nutras fiŝeton per paneroj.

PONJO: Vi ne, sed mi, jes.

MICJO (*mirante levas la manojn*): Vi nutras mian fiŝeton per paneroj? Eble eĉ per surŝmirita mielo aŭ butero? Kaj mi stultulo ĉiam prisilentis antaŭ Vi, ke... Ĉu vi konas tiun orfiŝeton, kiu naĝas antaŭ vi, Ponjo?

PONJO: Kompreneble, ke mi konas ĝin. Ĝi estas nia malnova fiŝeto Belami.

MICJO: Vi opinias? De kiam vi konas ĝin?

PONJO: Kvar jarojn. De tiam, kiam vi alportis ĝin hejmen kaj mi poste devis viŝi la tutan ĉambron.  
MIĈJO: Eh, nun mia Ponjo eraras. Unue vi ne konas ĝin kvar jarojn, sed vi konas ĝin ek de hieraŭ. Krom tio ĝi ne estas Belami. Belami estas mortinta jam tri jarojn.

PONJO: Sed mi ĉiumatene vidas ĝin.

MIĈJO: Vi vidas, ĉu? Sed tio, kion mi vidas estas, ke ĉiusemajne naĝas en fiŝujo mortinta orfiŝeto, ke mi jam tri jarojn kaŝe elprenas ĝin kaj anstataŭ ĝi metas alian fiŝeton. Ĉu vi eĉ povas imagi, kiel malfacile estas ĉiam havigi same grandan fiŝeton? Ĉu vi scias kiel komplikita estas eniri la domon portante sub la mantelo ujon kun orfiŝeto dum vi ĉirkaŭprenas min?

PONJO (*ege mirigita*): Kaj mi tion tute ne rimarkis.

MIĈJO: Vi ne, sed mi rimarkis. Mia pantalono estis ĉiam plena de akvo, same la ĉemizo. Sed la plej malbono nun venos. Kien meti la senvivan fiŝon? En la ĉambro ni havas centran hejtsistemon kaj en la kamenton mi ne povis ĝin ĵeti, ĉar vi ĉiam staris apude. Foje mi ĵetis ĝin en la banujon, sed ĝi ŝtopis la forkondukan tubon. En la necesejon mi ne volis ĵeti ĝin, tio ŝajnis al mi kvazaŭ manko de estimo. Mi, do, estis devigata meti ĝin en la poŝon kaj dum horoj kuri ĉirkaŭe kun la mortinta fiŝo en la poŝo, serĉante okazon liberiĝi de ĝi. Foje ĝi falis el mia poŝo antaŭ mia ĉefo, kaj foje mi sukcesis en iu bufedo meti ĝin sur la sandviĉon anstataŭ sardelo. Ĉion ĉi mi faris por evitigi al vi doloron, ĉar mi pensis, ke vi ŝatas nian orfiŝeton. Sed vi mortigadis ĝin ĉiam nutrante ĝin per paneroj.

PONJO (*ekploras*): Mi tion bedaŭris ĝin, Miĉjo.

MIĈJO: Bedaŭris, kial?

PONJO: Ankaŭ mi ĉiusemajne trovis en fiŝujo po unu mortintan fiŝeton. Mi estis konvinkita, ke ĝi mortis pro malsato. Ankaŭ mi ĉiusemajne aĉetadis

novan fiŝeton serĉate cent kaŝejojn nur por ke vi ne rimarku, ke via Belami pereis.

MIĈJO (*estas kortuŝita, sed kiel vera viro ne volas cedi, se li jam foje pravis*): Kaj pro kio vi nutris ĝin per pano?

PONJO: Provu vi ĉiumatene sola trinki kafon. Vi vidos kia malagrabla sento estas, se iu rigadas vin en buŝon kvazaŭ demandante: kaj mi? Ĉu mi nenion ricevos?

MIĈJO: Sed ĉiumatene ĝi ricevis formikovojojn.

PONJO: Paneroj estas malpli multekostaj.

MIĈJO: Ankaŭ formikovojoj ne multe kostas. Dum kvar jaroj ĝi formangiĝis nur por kelkaj dinaroj.

PONJO: Krom paneroj.

MIĈJO: Kion signifas: krom? Paneroj kostas neniom.

PONJO (*kolere*): Paneroj kostas neniom? Iru vid-alvide en la vendejon kaj postulu iom da paneroj. Vi vidos kiom ili kostas.

MIĈJO: Bone, aldonu mi krome dudek dinarojn por paneroj, tiuokaze la nutrado de nia orfiŝto kostas dudek dinarojn kaj iom. Sed nun estas fakte enalkulita ĉio, ankaŭ via donaco por naskiĝtago.

PONJO: Kia donaco?

MIĈJO: No, vi donacis al mi antaŭ du jaroj formikovojojn por dek dinaroj.

PONJO (*tuj memoras sian bonagon*): Ovojn por dek dinaroj kaj fiŝujon!

MIĈJO (*denove ekkoleras*): Ponjo, tiel vi ne rajtas kalkuli. Ĝi estis nenia fiŝujo, sed simpla botelo por acidaj kukumoj.

PONJO: Ĉu ĝi ne estis bona?

MIĈJO: Kompreneble, ke ĝi estis bona. Sed kiam vi donas al mi simplan botelon de konservado, kiu ĉe rando iom difektigis kaj pro tio fariĝis nekonvena por konservado, do, vi ne povas tion kalkuli donaco.

PONJO (*Rapidege respondas*): Kaj riparitan peltokolumon vi povas kalkuli donaco por la naskiĝtago?

MICJO: Kompreneble, ke mi kalkulas. Memoru, ĝi kostis mil dolarojn. Krom tio la peltisto devis enmeti pecon da nova pelt.

PONJO: Kiun ĝis hodiaŭ vi ne pagis.

MICJO: Egale! Ĉu li admonas vin aŭ min?

PONJO: Al mi estus malagrabla donaci ion, kion mi ankoraŭ post la duono de jaro ne pagis.

MICJO: Ankaŭ vi ne pagis vian kukumbotelon. Vi prenis ĝin el la ŝranko kaj metis sur la tablon kiel donacon. Krom tio la botelon ni ricevis de mia patrino inter ĉiuj aliaj aĵoj, kiujn ŝi donacis al ni okaze de nia geedziĝo.

PONJO: Jes, ĉar ŝi mem ne plu bezonis ĝin.

MICJO: Kiu diras tion? (ekscitite). Kial ŝi ne povus plu uzi ĝin? Tion mi volus scii. Bonvolu tuj klarigi al mi.

PONJO: Kaj por kiu ŝi konservas? Vi manĝas kukumojn nur dimanĉe kaj dimanĉe via patrino ĉiam tagmanĝas ĉe ni.

MICJO: Tio ja ne estas kaŭzo por uzi la kukumbotelon de mia bona panjo kiel fiŝujon.

PONJO: Ĉu vi aŭ mi metis la orfiŝeton en ĝin?

MICJO: Kompreneble, ke mi metis ĝin en la botelon, kaj kion alian mi povis fari? Ĉu mi malbonigu mian naskiĝtagon? Sed mi tuj rekonis la botelon de mia patrino. Nur nenion mi diris. Sed se Vi ankoraŭ hodiaŭ volas riproĉi ĝin kiel donacon por naskiĝtago...

PONJO (eluzas la okazon por eliri el glitiga temo): Ni ne riproĉu unu al la alia la naskiĝtagajn donacojn. Ni nur kalkulu, kiom kostas nia orfiŝeto Belami. Kaj en tiu okazo vi devas kalkuli ankaŭ la vitron.

MICJO (kiam viroj ne scias kion diri ili komencas krii): Sed la botelon ni ne aĉetis, ni havis ĝin jam de antaŭe.

PONJO: Jes, por alia celo, Miĉjo.

MICJO: Bone, por alia celo, sed se oni ne uzas ĝin por tiu celo kaj ĝi staras malplena...

PONJO: Ĉe ni ekzistas multaj aĵoj, kiuj staras malplenaj.

MICJO: Ekzemple?

PONJO: Via skribotablo, Miĉjo.

MICJO: Skribotablo, skribotablo, ĝi apartenas al meblaro, same kiel fortepiano kaj libroŝranko. Ĉu vi entute dezirus vivi kun viro ne havanta skribotablon?

PONJO: Sed vi neniam skribas sur ĝi, Miĉjo. Ni estas sep jarojn geedziĝintaj kaj sur la skribotablo vi ankoraŭ ne skribis eĉ unu vorton. Nu-u-u, mi volus scii, kion Vi dirus, se mi uzus vian skribotablon por kudrotablo.

MICJO (batas per pugno): Vi jam faris tion. Vi puŝis viajn cifonojn en ĝin.

PONJO: Ili estas viaj propraj ŝiritaj ĉemizoj.

MICJO: Al diablo! Ankaŭ mi preferus aĉeti la novajn anstataŭ ĉiam portadi la flikitajn.

PONJO: Kaj mi preferus, ke vi ne deŝiradu ilin tiel ofte. Ponjo kaj Miĉjo laciĝis de disputado. Eksilentis.

PONJO (delikate demandante): Kiom fine kostas al ni nia orfiŝeto, Miĉjo?

MICJO (kvietiĝis kaj respondas milde): Iom da formikoj, iom da paneroj kaj de tempo al tempo malgrandan disputon.

PONJO: Viroj, ja, devas de tempo al tempo krii. Ĝi estas neevitebla. Kaj ni virinoj tion devas paciencie elteni. Krom tio al mi pli plaĉis, ke vi, Miĉjo, krii pro la orfiŝeto ol pro via orhorloĝo, kiu hodiaŭ matene falis al mi de sur la balkono kiam mi brosis vian kostumon.

Prezentita dum la »Drama vespero« en junio 1950 kaj dum »Interkona vespero« de la XV. jugoslavia kongreso en Ljubljana, julio 1951.



Emilija Lapenna:

## AMO DUM LA JARDEKOJ DE HOMA VIVO

Tempo nuna. Scenejo: societejo.

Personoj:

Komentarianto

kaj 6 paroj en diversaj aĝoj.

KOMETARIANTO: Ĝi komencas ŝteliĝi en la homan koron tre frue, ofte post la deka, sed tute certe antaŭ la dudeka jaro. En tiu homa aĝo ĝi estas brila sento, plena de ĝojo kaj gajeco kvazaŭ floranta branĉo en printempo. Ĝi konas nur ridon kaj kanton. Jen unu tia printempa paro.

*Enkuras du 18-jaraj gejunuloj.*

LI: Ĉie mi serĉis vin. Tra kiu pordo vi forkuris el la lernejo? Vi, vi...

SI (*nur laŭte ridas*).

LI: Ĉu vi scias kion mi lasis pro vi? La futbalkonkuron. Pripensu. Mi riskas esti priridata de miaj kolegoj, ke mi pro iu knabino lasis tiun sensacian konkuron. Nu, kion vi diras?

SI: Kiel ridinda vi estas kiam vi koleras, hi, hi, hi.

LI: Oh, sorĉistino, se mi kaptos vin, mi tiel kisos vin, ke vi forgesos ridi.

SI: Kaptu min, se vi povas!

LI: Atendu, atendu!

SI: A jes, ĝuste!

*(forkuras unu post la alia)*

KOMETARIANTO: Jen, vi vidis amon en formo de infana ludo, bedaŭrinde tiu tempo rapide pasas. Kiam la dudeka jaro estas post ni, ni volas esti tre spertaj, ni pensas ke ni jam ekkonis amscion ĝis la fundo, havante post ni nur kelkajn junecajn aventurojn.

*Eniras studenta paro, aĝo inter 20—25 jaroj.*

LI: Neniu virino povus entuziasmigi min plu. Ĝis la fundo mi ekkonis tiun neinteresan estaĵon. Entute kion amo povas doni al homoj? Ĉiam la sama afero, diferenco estas nur ke unu havas blondan, alia nigran hararon. Phi! Fiziologia bezono, nenio alia. Jes, ĉu vi venos hodiaŭ al mi?

SI: Mi ne scias. Eble mi iros al Ivo, aŭ al Branko, eĉ plej prefere mi vizitus Zdenkon. Li tamen estas iom diferenca de aliaj junuloj.

LI: Kio, kio, kio? Pri kio vi parolas? Kia Branko, kia Zdenko, Ivo? Ĉu vi frenezigiĝis? Vi versaĵne ne volas diri, ke vi kun ĉiuj tiuj...

SI: Ankaŭ mi konstatis, ke la afero estas ĉiam sama. Mi serĉas ion interesan, ion alian, ion sensacian, ne nur la fiziologian bezonon.

LI: Mi montros al vi sensacion. Diable, kaj mi tiel kredis pri via honesto, aĉulino, ĉu vi scias, ĉu vi scias, ke mi...

SI: Kion karulo, ĉu vi eble amas min, ha-ha-ha. Ĉu vi uzas tiun arkaikan vorton, vi por kiu amo estas nur la fiziologia bezono?

LI: Silentu, mi nur tiel diris, sed diablo vin prenu kun ĉiuj viaj Brankoj, Zdenkoj, oh! mi montros al vi ĉiuj.

SI: Karulo, karulo, io terura okazas al vi, vi montras signojn de tute malmoderna junulo, vi estas jaluza! Ha, ha, ha, enamiĝinta, jaluza, knabo, kio okazis al vi?

LI (*nur levas ŝultrojn*).

SI: Mi diros al vi. Juna stultulo vi estis kaj mi montris al vi ke neinteresaj virinaj estaĵoj povas tamen esti interesaj ĝis ekscitiĝo. Stultulo, sed tamen venu.

*(Foriras ambaŭ)*

KOMETARIANTO: Ilia konduto estas pardonebla. En tiu tempo homoj ne scias kion ili volas, ne faras tion, kion ili deziras kaj sub ĉiuj kondiĉoj volas esti pli aĝaj, pli saĝaj kaj pli maturaj ol ili

fakte estas. Sed ankaŭ tiu tempo rapide pasas kaj al nia vivpordo frapas la trideka. *Eniras 30-jara geedza paro.*

PATRO (*kun infanŝuo en la mano*).

PATRINO: Nu, ĉu vi finis, nia Daĉjo ne povas eliri sen unu ŝuo. Kaj li ploras. Dio mia rapidu, ke infano estu en la freŝa aero. Li fariĝos pala sen sunumo. Kaj mi volas liajn vangojn ruĝaj kvazaŭ ĉerizoj, jes, mia Daĉjo devas esti la plej plaĉa, la plej ĉarma infano en la tuta strato, ne, tio ne kontentigas min, en la tuta urbo.

PATRO: Nur Daĉjo, ĉiam nur Daĉjo. De kiam naskiĝis Daĉjo vi zorgas nur pri li, min vi entute forgesis.

PATRINO: Ho ne, ne, ne (*kisas lin*). Ĉu mi ne raportas ĉion pri Daĉjo al vi? Sed nun mi petas vin rapide riparu ŝueton. Daĉjo estas sen unu ŝuo. Li povus kapti malvarmumon. Pripensu. Nia Daĉjo tusos, ricevos inflamon, ftizon, rapidu, ĉu vi ne komprenas kiel grava estas la ŝuo de nia Daĉjo?

PATRO: Jes, jes, mi komprenas, multe pli grava ol mi tuta de la kapo ĝis la piedfingroj. Jen, mi faris!

PATRINO: Nu, dank al dio! (*forkuras kun la ŝuo*).

PATRO: Hja, tio estas ĉarmoj de junpatreco! (*foriras*).

KOMENTARIANTO: Ankaŭ tiu homa aĝo rapide pasas, la infanoj kreskas kaj ni alproksimiĝas al la kvardeka. La juneco estas post ni, kaj ofte en tiu aĝo ni konstatas, ke malmulton ni ĝuis, malmulton havis el la vivo kaj jen, la tempo por refari ĉion preskaŭ ne plu ekzistas. Sed pro tio grumbloj kaj ĉagrenoj ekzistas en abundeco.

*Eniras paro de kvardekjaruloj.*

LI (*komencas legi gazeton*).

ŜI (*havanta tukon sur la kapo*): Nur labori kaj labori, gladi, lavi, fliki, kuiri jen mia vivo, nenion alian mi havis. De la frumateno ĝis vespero nur labori por vi kaj viaj infanoj.

LI: Ĉu nur miaj estas la infanoj?

ŜI: Kompreneble, verŝajne vi ne pensas, ke estas de najbaro? Nenian komprenon vi havis pri mi. Vi entute ne konscias, ke pro vi mi lasis la karieron. Jes, mi posedis talenton, se mi ne estus edziniĝinta al vi mi fariĝus filmaktoro. Miaj bildoj estus en ĉiuj gazetoj, la ĵurnalistoj kuras ĉirkaŭ mi. Kaj nun, jen, mi kuras en tiu kuirejo tutajn tagojn, kia vivo, dio mia.

LI: Kaj ĉu vi pensas ke mia vivo apud vi estas alloga? Ĉu vi...

ŜI: Ne parolu! Kion vi povis atingi en la vivo? Vi, ja, posedis nenian talenton. Via sola sukceso estis konkeri min, je mia malfeliĉo. Nun mi gustumas la sekvojn de tiu via sukceso. Jen tie monto da nelavita teleraro, alia monto de malpura tolaĵo, mi aspektas kvazaŭ sorĉistinaĉo, eĉ tempon por kombi min, mi ne trovas. Oh! kian fatalan eraron en la vivo mi faris. Ah, dio mia, la kuko, la kuko estas en la forno, mi forgesis. Kuru, savu ĝin, ĝi bruliĝos, al diablo meditoj, nun savi la kukon gravas. Kukon! (*Ambaŭ forkuras*).

KOMENTARIANTO: Jen ankaŭ tiu, eble la plej doloriga tempo de la homa vivo pasas, kiam oni vidas ke la juneco estas for, nerevokeble for. Post tio oni eniras en pli kvietan havenon de la homa aĝo, en la kvindekan. Tie oni vivas de rememoroj. *Eniras paro de kvindekjaruloj.*

ŜI: Jen via kafeto. Ĝi estos certe tre bongusta, mi zorge sukerumis ĝin. Jes, ĉu vi rememoras nian unuan kafotrinkon, tie, en la malnova kafejo »Meduliĉ«?

LI: O jes, vi estis tiel timema.

ŜI: Kaj vi granda kavaliro. Vi proponis al mi ĉion, eĉ ĉampanon, kvankam en tiu kafejo ĉampanon entute oni ne prezentis. Sed mi volis montri mian modestecon kaj mi prenis nur tason da kafe.

LI: Jes, tiam junularo estis alia ol hodiaŭ. Bele estis tiam vivi.

SI: Sed en kia embaraso mi estis tiam, mi ne sciis, ĉu akcepti vian amon, aŭ de tiu alia, kiu ankaŭ iurilate plaĉis al mi.

LI: Kion? Alia?

SI: Nu jes. Ĉu vi kredas, ke nur vi svatis min? Ho, ne, mi havis multajn ŝancojn, sed mi elektis vin, ĉar vi estis tiel kara junulo, ĉiam bonhumora kaj kiam vi kutimis venadi sub miajn fenestrojn vi tiel ĝoige fajfis kvazaŭ birdo. Eh! jam tridek jaroj pasis de tiam.

(*Aŭdebla »avo, avinjo«*). Ah, nia Daĉjeto venis, nia kara nepeto, ni rapidu, ni rapidu renkonte al li (*rapide foriras*).

KOMENTARIANTO: Memoroj kaj genepoj plenigas tiun homan agon. Iom post iom ankaŭ memoroj velkas kaj homo eniras en vesperan krepuskon de la vivo. Ĉirkaŭ la sepdeka multaj aferoj, belaj kaj malbelaj, estas jam forgesitaj, kelkajn oni nur pene, pene sukcesas rememori.

*Eniras paro de sepdekjaruloj.*

SI: Jen, ni sidiĝu ĉi tie, estas tiel bela suno, ho, ĝi bone efikos al nia reumatismo.

LI: Jes, jes, ni sidiĝu.

SI: Aveto, ĉu vi scias, ke lasttempe mi komencis forgesadi ĉion, terure forgesadi.

LI: Jes, jes, tio okazas ankaŭ al mi.

SI: Jam tri tagojn mi turmentas mian povran maljunan kapon, kaj mi neniel sukcesas rememori unu vorton, unu vorton tre gravan, kiun mi ofte menciis en pasinta tempo, oh! kiu estas tiu vorto, ĝi komenciĝas per A.

LI: Per A, eble, eble, aspirino?

SI: Ne, aspirinon vi devas preni ĉiĉespere, por ke vi pli kviete dormu, ne, ĝi ne estas tiel longa vorto, tute mallonga ĝi estas.

LI: Eble azeno?

SI: Ne, ne. Ĉu mi la vorton azeno ofte uzis en mia vivo? Ĉu mi iam diris al vi azeno dum nia pli ol

kvindekjara kuna vivo? Ne, ne ĝi signifas ion belan, tre belan, aha! Jen mi fine rememoras. Amo. Amo.

LI: Amo? Pri ĝi oni skribas en romanoj.

SI: Jes, sed ankaŭ ni havis nian romanon kaj la amo ludis gravan rolon en ĝi.

LI: Ĉu? Mi ne plu rememoras. Nun por mi estas aspirino multe pli grava ol amo. Iru ni, mi komencas senti vesperan freŝecon.

SI: Iru, ni iru. (*Foriras*).

KOMENTARIANTO: La amo eniras homan vivon kvazaŭ printempa sunradio, ĝi akompanas la homon, ĝisvivas diversajn transformiĝojn kaj finiĝas kiel forgesita vorto. Jen la sorto de la plej grava homa sento!

## FINO

*Prezentita dum la »Maja aranĝo« en majo 1954.*

*Emiliĵa Lapenna:*

### LETEROJ KAJ SOLDATOJ

*Laŭ la ideo pruntita el unu filmo*

Personoj:

Beĉjo

Tonĉjo, ambaŭ studentoj en soldatservo,  
vestitaj en soldataj bluzoj.

*Enkuras en la societejon. Tonĉjo tenas en la mano  
kelkajn leterojn.*

BEĈJO: Tonĉ' feliĉulo, feliĉulo, feliĉulo, ĉu vi kom-  
prenas, kiel feliĉa vi estas, sep leterojn vi rivecis,  
jes, sep, kaj mi eĉ ne unu.

TONĈJO: Ne tedu min.

BEĈJO: Sep leterojn, ah, se mi estus ricevinta alme-  
naŭ duonon de unu.

TONĈJO: Stultulo, kiel oni povas ricevi duonon de la  
letero?

BEĈJO: Nu, mi nur meditas tiel. Sed diru, ĉu unu  
knabino sendis al vi ĉiujn sep, aŭ sep knabinoj  
po unu?

TONĈJO: Mi jam diris al vi, ke ne tedu.

BEĈJO: Ah-h-h. Ŝi certe skribas, ke ŝi amas vin.

TONĈJO: Jes, jes, jes.

BEĈJO: Ke ŝi adoras vin, ke ŝi restos ĉiam fidela  
al vi.

TONĈJO: Ĉu Vi iam aŭdis pri la virinoj, kiuj ne pro-  
mesas eternan fidelecon? Bedaŭrinde nur promesas.

BEĈJO: Ŝi pensas pri vi, ŝi atendas vin, ŝi sopiras  
al vi.

TONĈJO: Jes, jes, jes, ŝi songas pri mi, ŝi fantazias  
pri mi, ŝi ŝvitas pro mi, ŝi oscedas pro mi, ŝi tusas  
pro mi. Vi, vi azeno.

BEĈJO: Sensenta brutulo. Sed donu al mi la leterojn,  
ke mi almenaŭ priflaru la kovertojn.

TONĈJO: Lasu min, jam la centan fojon mi diras  
tion al vi.

BEĈJO: Donu al mi, ne estu tia egoisto.

TONĈJO: Ne, ne, lasu min.

BEĈJO: Donu, nu, donu. (*Post mallonga batalo B kon-  
keris la leterojn.*)

TONĈJO: Jen, nu?

BEĈJO: Kio estas tio? Pagadmono, pagadmono, pa-  
gadmono.

TONĈJO: Nu, saĝulo, nun vi vidas kiajn amleterojn  
mi ricevis. Estas ses admonoj pri nepagitaj parto-  
pagoj pro la radiofono kaj en la sepa ili informas  
min, ke la radiofonon ili konfiskis.

BEĈJO: A-a-a.

TONĈJO: Kaj vi, bovo, pensis, ke oni skribas nur  
amleterojn al soldatoj.

*Prezentita dum la »Aprila ŝercvespero«, aprilo 1955.*

### KIO ESTAS AMO?

Societejo dum la kunvena vespero. Per ŝanĝo de la nomoj de stratoj, filmoj kaj filmaktoroj, oni povas aktualigi la tekston. Apud la tablo staras:

**KOMENTARIANTO:** De la pratempo ĝis hodiaŭ oni kantas, skribas kaj deklamas pri amo. Al neniu homa sento estis dediĉita tioma atento kiel al amo. Do, kio ĝi estas fakte. Ĉu iu el vi eble sciis klarigi ĝin?

*El la sidanta publiko ekstaras unu post la alia*

**SIMPLA JUNULINO:** Por mi amo estas nenia problemo. Mi entute ne komprenas, kial homoj faras tiel grandan aferon el tiu simpla ĉiutagaĵo. Renkonti beletan knabon inter la dudeka kaj kvardeka jaroj, kiu ne estas tute stulta kaj tute malpura kaj jen la amo! Se li havas ion en la poŝo pli bone, tion pli granda amo. Jen, ĉu tio estas problemo? Kaj kiam la beleta knabo ne plu plaĉas al mi, aŭ mi ne plu plaĉas al li, oh! ekzistas multaj, multaj aliaj beletaj knaboj kaj mi denove enamigas kaj al mi denove estas bele, bele, bele, nu, ĉu mi ne pravas?

**JUNULO:** Oh, por mi amo estas grandega problemo. Ek de mia infanaĝo mi portas en la animo bildon de mia preferata, neniam ĝis nun renkontita, virina estaĵo. Mi estas tiom modesta, mi postulas tiom malmulte kaj tamen mi ne ĝuis feliĉon trovi ŝin. Mi deziras ke ŝi estu nur bela, svelta, havanta perfektan korpon, inteligenta, bonkora, nobla, milda, riĉa, eleganta, el bona familio, posedanta altan instruitecon, ankaŭ propran vilaon kun parko, jes, ankaŭ aŭtomobilon, kvankam mi persone malŝatas tiun vulgaran trafikilon, sed ĝi estas praktika tamen. Nu, nur tiujn kelkajn ecetojn mi postulas kaj ĝis hodiaŭ mi ne sukcesis trovi ilin. Sed la espero ne lasas min. Eble, eble, ĉi tie mi trovos mian idealon?

**MODERNA JUNULINO:** Mi konscias, ke mi estos ĉiam malfeliĉa. Neniam mi trovos knabon similan al Steward Granger, aŭ James Steward aŭ al Errol Flynn. Ah! kiel ili bele amas en filmoj. Kiel ĉarma estis Steward Granger en la »Trezoro de caro Salomono«. Neniam niaj knaboj scios tiel mortigi serpenton, kiel li heroe faris. Kaj kiel li poste ĉirkaŭbrakis Deborra Keer ah! mi preskaŭ svenis en mallumo de kinosalono. Kaj kiel timige ĉarma estis Laurence Oliwer en »Wuthering heights«, kiam li paroksisme adoris sian mortintan amikino. Tio estas vera amo kaj ne tio, kion mi vidas ĉirkaŭ mi. Tute simplaj knaboj kiuj promenas en Ilica kaj diskutas sur placo, kraĉas ĉirkaŭ si kaj portas negladitan pantalonon, teruraĵo! Uh! pantalon! Mia idealo devas porti piratojn botojn kiel Errol Flynn, tio estas digna vestaĵo por vera viro. Mi jam vidas, ke en Zagreb mi ne sukcesos trovi veran viron, mi devos iri al Hollywood.

**DIKETA JUNULO:** Nu, amo por mi estas tre simpla enigmo. Ĉiu bela knabino prezentas al mi amon. Kaj bela knabino estas ĉiu havanta du gambojn, du brakojn, unu kapon, hararo povas esti blonda, bruna, ruĝa, nigra, por mi ĉio-tute egala. Ŝi povas esti stulta kvazaŭ anserino, min tio neniel ĝenos. Ĉu saĝaj virinoj feliĉigis siajn virojn? Tute ne. Ŝi estu babilema aŭ silentema al mi estas ĉio all right. Ĉu ŝi silentos aŭ babilos mi pensos lau mia plaĉo. Ŝi povas esti laborema aŭ maldiligenta, eĉ mi preferas maldiligentajn virinojn, laboremaj tedas pli per senĉesa ordigado kaj purigado. Nur unu tipon de virinoj mi ne tolerus. La propagandistinojn. Uh! kiam ŝi komencus propagandi mondfederalismon, UEA-ismon, SAT-ismon, esperantismon — kaj plenigus la domon per deklaracioj oh! tio estus tro komplikita por mi, tio min eĉ devigus pensi kaj tio estas por mi plej terura.

KOMENTARIANTO: Do, post tio, kion vi aŭdis, kia  
konkludo:

KIOM DA HOMOJ, TIOM DA AMTIPOJ!

*Prezentita dum la »Maja aranĝo«, majo 1954*

## ENHAVO

|                                                                     | Paĝo |
|---------------------------------------------------------------------|------|
| POR LA KUNVENOJ DUM LA DEKKVARA DE<br>DECEMBRO: »ZAMENHOFA VESPERO« |      |
| Inter parolo kun la busto de Zamenhof . . . . .                     | 7    |
| Venkita malespero . . . . .                                         | 16   |
| PUR LA DIVERSKARAKTERAJ SOCIETAJ<br>KUNVENOJ                        |      |
| Internacia kiso . . . . .                                           | 24   |
| Troa scivolemo . . . . .                                            | 35   |
| Sinjoro Profites . . . . .                                          | 44   |
| Granda kverelo pro bagatelo . . . . .                               | 52   |
| Amerika geedziĝo . . . . .                                          | 56   |
| Ialerio de fiecoj . . . . .                                         | 60   |
| Akvario . . . . .                                                   | 68   |
| Amo dum la jardekoj de homa vivo . . . . .                          | 74   |
| Leteroj kaj soldatoj . . . . .                                      | 80   |
| Kio estas amo? . . . . .                                            | 82   |